

Bulgara Esperantisto

Marto 1989



ENHAVO

- 2 Al aktiva ekstermovada agado! (Nikola Nikolov)
- 3 La kluboj — formo de faka aktivado (Dimităr Papazov)
- 5 Mi estas esperantistino (Joanna Konstantinova)
- 6 Pir la naturo de Zamenhofa mondkoncepto (1879—1885) (Canko Murgin)
- 8 „Bulgara Esperantisto” — antologio de bulgara literaturo (Krâstju Karucin)
- 11 El la arkivo de bulgara E-muzeo (D. Simeonov)
- 12 Pri la individua propagando (Dimităr Haĝiev)
- 13 Esperanto en la praktiko (Petko Arnaudov)
- 15 Juna Esperantisto (Atanas Ilkov)
- 16 Virina poezio: Liljana Stefanova, Stanka Penĉeva, Vanja Petkova, Mirjana Baŝeva
- 18 Beletro (Jordan Vâlĉev)
- 23 Denove pri la planlingva problemo (Mariana Evlogieva)
- 24 Leteroj de korespondamiko (Lilija Koleva)
- 25 Ni recenzas
- 27 VI Internacia Konferenco de KEK (Ljuben Grozdanov)
- 28 Zamenhofaj tagoj
- 32 Deziras korespondi
- III Modo

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redaktoroj: Atanas ILKOV kaj Evgeni GEORGIEV

REDAKCIA KONSILANTARO: Dimităr HAĜIEV, Georgi MIĤAL-KOV, Krâstju KARUCIN, Kunĉo VÂLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV.

Adreso de la redakcio: „Ĥristo Botev” 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86.

Ŝtata preŝejo „Georgi Dimitrov” — bul. „Lenin” 117, 1113 Sofio

Eldonkvanto: 6500 ekz.


Al la kunlaborantoj: Kontribuajlojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto” estas abonebla per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por la ceteraj landoj — 7.80 lv. Prezo de unuopa ekzemplero — 0.50 lv.

Estas organizita surbendigo de revuo „Bulgara Esperantisto” por la bezonoj de blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Veneta Zjumbjuleva — aktorino en Bulgara Esperanto-Teatro.

Foto: Kirilka SAVOVA



OKAZONTA LIBRO-FOIRO

De la 21-a ĝis la 25-a de majo ĉi-jare en la internacia Esperanto-Kurŝejo en Pisanica okazos Foiro de E-libroj, organizota de BEA. Partoprenantoj el diversaj landoj povos prezenti siajn eldonojn, kontakti gekolegojn, interŝanĝi sperton, esplori la eblecojn pri kunlaboro en la sfero de libroeldonado kaj librovendado, subskribi konkretajn kontraktojn. La vizitantoj havos la eblecon informiĝi pri novaj libroj, aĉeti aŭ mendi ilin, fari proponojn rilate la pliperfektigon de la libroeldonado. Por pliaj informoj turnu vin al la Unuigita Redakcio ĉe BEA, adreso: Unuigita Redakcio ĉe BEA, bul. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario; por leteroj: P. K. 66, 1000 Sofio, Bulgario.

Estu niaj bonvenaj gastoj!

TEMO DE N-RO 8/1989

Ĉi-jare sur la paĝoj de nia revuo vi, karaj legantoj, povas legi materialojn pri kelkaj gravaj temoj de la E-movado en Bulgario. Por trakti tiujn problemojn konvinke kaj amplekse, la Redakcio de „BE” bezonas vian helpon kaj kontribuojn.

Temo de numero 8/1989 estos: „Kiel forĝi esperantistojn?”. Nobla kaj malfacila tasko, Ĉu ne?

Skribu al ni pri viaj sperto, opinioj kaj proponoj. Vi povus rakonti ankaŭ pri allasitaj eraroj tiudirekte. Fakte, multe da homoj lernas nian lingvon kelkajn monatojn, jaron, eĉ du jarojn, kaj poste forlasas la E-movadon. Ili ne sukcesas trovi sian lokon inter ni.

Kial? Certe vi havas respondon al tiu demando.

La Redakcio atendas viajn leterojn ĝis la 15-a de majo 1989.



Jaro 58

N-ro 3

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA

DUE...

Humphrey TONKIN

Ĝuste kiel ni esperis, la jaro 1988 montriĝis jaro de planado — jaro en kiu ni analizis la progreson de UEA kaj de la Esperanto-movado, kaj faris rekomendojn por la estonteco. Nova Strategia Plano estis principe aprobita de la Komitato de UEA kaj transdonita al la membraro (en la oktobra revuo „*Esperanto*“) por ties reago kaj komentoj. Surbaze de tiuj rekomendoj, la plano estos modifita kaj pli precize fokusita.

Tiu Plano difinas tri ĉefajn prioritatojn por la komenco de la dua jarcento de Esperanto. Iom taŭge, iliaj komencliteroj formas la vorto DUE. Temas pri:

Disvastigo de Esperanto;
Utiligo de Esperanto;
Edukado al tutmonda konscio.

Se oni ne lernos Esperanton, la kulturo kaj socio de Esperanto ne plu vivos. Ni salutu kaj gratulu tiujn, kiuj mem instruas la lingvon, profesie aŭ amatore, aŭ kiuj pretigas lernilojn aŭ organizas kursojn. Ni ne dediĉas sufiĉan atenton al tiuj plej bazaj, plej esencaj laborantoj en nia movado. Ni ankaŭ ne mem dediĉas sufiĉan atenton al propra plibonigo de nia lingvoscio.

En rilata tereno, tiuj, kiuj informadas pri Esperanto al la ekstera publiko ludas pres-

kaŭ egale esencan rolon. Kune kun niaj instruistoj, ili konsistigas la *disvastigantojn* de Esperanto.

La *utiligantoj* de Esperanto estas tiuj, kiuj celas praktike apliki Esperanton — en scienco kaj tekniko, kaj en aliaj sferoj de la homa vivo. Ili estas tiuj, kiuj verkas kaj arte prezentas en Esperanto. Ili estas ankaŭ tiuj, kiuj helpas nin pli bone uzi Esperanton, montrante al ni novajn vojojn al ĝia praktika utiligo aŭ plifortigante niajn organizaĵojn kaj instituciojn.

Sed por kio lerni Esperanton, por kio utiligi ĝin? Ĉefe temas pri tio, ke ni opinias, ke pli vasta utiligo de Esperanto igus la mondon pli kapabla trakti siajn aferojn, pli riĉa spirite, pli tolerema kaj komprenema. Nia tria tasko do — post lernado kaj utiligado — estas uzi ĝin por fariĝi pli bonaj civitanoj de la mondo, kaj por helpi la homaron solvi siajn problemojn pace, harmonie kaj kompreneme.

Disvastigo, Utiligo, Edukado al tutmonda konscio — jen, do, tri principoj, tri ideoj, kiujn ni kiel esperantistoj povus bele apliki en la Nova Jaro 1989. En la dua jarcento, DUE fariĝu nia devizo.

(El „*Esperanto*“, n-ro 1/1989)

AL AKTIVA EKSTERMOVADA AGADO!

Ni uzas Esperanton plej ofte por niaj propraj kaj por movadaj bezonoj. Sendube, tio estas necesa kaj utila agado. Ĝi helpas la evoluon, disvastigon kaj praktikadon de la lingvo.

Sed tiu ĉi interna aktivado estas nur la unua duono de la ampleksa kaj multfaca E-agado. La alia duono, neniel malpli grava, estas la aplikado de Esperanto fare de neesperantistaj instancoj, organizoj, oficejoj, entreprenoj, fabrikoj k. a. por iliaj celoj kaj bezonoj. La utiligo de Esperanto fare de neesperantistaj kolektivoj ofte estas subtakata kaj eĉ neglektata de la E-organizoj kaj de iliaj membroj. Tio estas rezulto de nia emo memizoliĝi kaj agadi en fermita samideana rondo kaj medio. Sed Ludoviko Zamenhof iniciatis kaj lanĉis Esperanton, foruzante siajn fortojn kaj bonhavan, por ke la lingvo servu ne nur al fermitaj sociaj rondoj, sed al la tuta homaro. Tion neniu el ni rajtas forgesi. Necesa estas vigla kaj ofte internaciskale planita kaj kunordigita agado. La homaro ne aplikados Esperanton, se ni esperantistoj ne eklaboros insiste kaj sisteme por realigo de tiu celo.

De tempo al tempo ni aŭdas kaj legas, ke en Bulgario apartaj E-organizoj sukcesis aranĝi la uzadon de Esperanto ekster nia movado. Jen kelkaj faktoj:

Turista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio daŭre kunlaboras kun Ŝtata Centro pri Turisma Reklamo por eldonado de prospektoj kaj broŝuroj en Esperanto. Krome ĝi prizorgas, kune kun Asocio „Monda Turismo“, la uzadon de nia lingvo dum la ĉiujaraj internaciaj remadoj laŭ Danubo. Internacia grupeto de geesperantistoj dum du semajnoj partoprenas la remadon, de urbo Vidin ĝis Silistra, propagandante kaj aplikante Esperanton.

Societo „Kosta Penev“ (Sofio) tradukis kaj presigis esperantlingvan broŝuron pri la agado de la organizo „Patrolanda Fronto“.

Dimităr Mutuŝev efektivigis eldonadon

de esperantlingvaj broŝuroj fare de la Bulgaraj Sindikatoj, la Komitato por Balkana Solidareco kaj Kunlaboro kaj la Centra Kooperativa Unuiĝo.

La Fervojista Sekcio ĉe BEA dum jaroj zorgas, ke en la horarlibro de Bulgaraj Fervojoj la klarigoj aperadu ankaŭ esperante.

Kiril Velkov tradukis artikolojn el revuo „Internacia Komputado“ por la bezonoj de la Komputila Centro ĉe la Teknologia Kemia Kombinumo en Vraca.

Nia aktivulo Ljubomir Trifonĉovski, dramaturgo de la Ŝtata Pupteatro en Vraca, organizis korespondadon de la teatro kun samspekaj teatroj en eksterlando. Rezulte de tio la teatro donis spektaklojn en Pollando. Ekde la pasinta jaro la departementaj radiostacioj en urboj Varna kaj Ŝumen havas emision ankaŭ en Esperanto.

Stefka Toteva laboras en panfabriko en urbo Gabrovo. Pere de Esperanto ŝi disponigis al la fabriko receptojn por preparo de diversspecaj pastfolioj. La receptojn ŝi havigis el Germana Federacia Respubliko pere de siaj korespondantoj.

Ankoraŭ multaj faktoj estas pri la klopodoj kaj sukcesoj atingitaj dum la lastaj jaroj de bulgaraj esperantistoj lige kun aplikado de Esperanto fare de neesperantistaj kolektivoj kaj instancoj. Sed se ni komparos la nunajn rezultojn kun tiuj atingitaj dum la pasinteco, ni konstatos, ke tiam ni havis pli grandajn kaj signifajn sukcesojn. Multaj el ni memoras pri la aperigataj de neesperantistaj eldonejoj turisma, virina, filma kaj junulara revuoj. Multaj esperantistoj kun nostalgio ankoraŭ parolas pri la kolora riĉenhava revuo „Nuntempa Bulgario“, kiu havis eldonkvanton de 10 000 ekz. Bulgara Kinematografio vendis filmojn en Japanio pere de nia lingvo. Ankoraŭ ni ne sukcesis restarigi la E-emision de Radio Sofia. La alumetfabriko en Bulgario variigis sian produktadon dank' al disponigo fare de esperantistoj de specimenoj de alumetoj el 18

landoj. Ankoraŭ ni ne sukcesis organizi tiel amasan korespondadon inter neesperantis-taj grupoj, kia estis organizita de BEA inter la du mondmilitoj.

Nun kiam la politika klimato sur nia planedo pliboniĝas kaj oni klopodas intensigi kaj plivastigi la ekonomiajn, kulturajn, sportajn, turismajn k. a. kontaktojn inter la landoj kaj ties popoloj, ekzistas tre favoraj kondiĉoj por vasta kaj kompleksa agado ekster nia movado. Per tia agado je ĉiuj niveloj ni rompos nian memvolan izolitecon, la prestiĝo de niaj lingvo kaj movado kreskos denove.

Ĉiuj ni devas pripensi kiamaniere ni povas utiligi Esperanton por nemovadaj celoj kaj taskoj, en la lokoj, kie ni laboras kaj loĝas. La afero estas grava kaj estas necese, ke nia asocia estraro kunsidu pri tio kaj estu ellaborita konkreta plano por laboro dum la sekvaj kvin-dek jaroj. Ni povas ankaŭ iniciati kaj efektivigi en la Internacia Esperanto-Kursejo konferencon por studi, diskuti kaj interkonsenti kiamaniere ni agu kaj kunlaboru.

Nikola NIKOLOV,
fakdelegito de UEA pri sporto
kaj turismo en Sofio

La kluboj — formo de faka aktivado

La kluboj estas unu el la novaj formoj de laboro en nia asocio, aprobitaj fare de la Plenkunsido de CE de BEA de la 16-a de januaro 1988, dediĉita al la renovigo en BEA.

Oni planas krei ĉe la teritoriaj societoj klubojn laŭ profesioj kaj interesoj. Ili povas funkcii ankaŭ ĉe entreprenoj, oficejoj kaj organizaĵoj. Celo de la kluboj estas pli vasta propagando, lernado kaj aplikado de Esperanto. Por fondiĝo de klubo estas bezonaj almenaŭ 5 personoj, membroj de la societo, kiuj elektas estraron, konsistantan el prezidanto, sekretario kaj membro. La klubojn sankcias la societaj estraroj. Ilin gvidas metodike la koncernaj sekcioj ĉe CE de BEA. Ĉe ĉiu E-societo oni povas fondi ne pli ol unu similan klubon, same ĉe entreprenoj, oficejoj, organizaĵoj.

En urboj, kie funkcias E-kulturdomoj, la klubojn laŭ profesioj kaj interesoj oni fondas enkadre de tiuj Domoj kaj ilin gvidas la Administra Konsilantaro de la Domo.

La kluboj ne havas propran konton, stampilon kaj flagon. La rimedojn por ties agado oni planas en la societaj buĝetoj. Ili povas kreskigi sian buĝeton pere de enspe-

zoj venantaj de laboriniciatoj, aranĝoj, subvencioj de aŭtonomaj organizaĵoj k. a. Sed nepre notu: sen la konsento de la kluba estraro, la societa estraro ne rajtas uzi la monrimedojn por aliaj celoj, ekster la sfero de la kluba agado. Antaŭ la jarkunvenoj, la kluboj, laŭ instrukcio de la Buroo de CE de BEA, okazigas preparkunsidojn.

La junaj esperantistoj povas krei E-klubojn ĉe la societoj kunlaborante kun la lokaj organizaĵoj de Komsomolo. Lernejoj, lernantaj kaj parolantaj Esperanton, sendepende de sia aĝo, povas fondi proprajn klubojn. E-instruistoj devas helpi metodike la agadon de la lernantaj kluboj. Ties agado devas esti intime ligita kun la laboro de la Kluboj de Internacia Amikeco ĉe la komso-molaj organizaĵoj.

La problemo pri fondo de kluboj laŭ profesioj kaj interesoj ĉe entreprenejoj, oficejoj kaj organizaĵoj estas aparte grava por pli intensa evoluo de la loka E-agado. Dank'al tiuj kluboj Esperanto povas atingi grandan disvastiĝon en la koncerna medio kaj trovi bonajn kondiĉojn por aplikado en la praktiko.

Dimităr PAPAŖOV,
ĝenerala sekretario de BEA



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

**Karaj samideaninoj —
legantinoj kaj kunlaborantinoj de „Bulgara Esperantisto“!**

**La Redakcio tutkore gratulas vin okaze de la 8-a de Mar-
to — Internacia Tago de Virinoj, kaj sincere bondeziras al vi
firman sanon, sukcesojn en via laboro kaj multajn feliĉajn
travivaĵojn!**

MI ESTAS ESPERANTISTINO

Estis aŭtune de 1984 jaro. En nia Literatura Rondo de Transportaj Laboristoj „Ĥristo Botev“, mia kolegi-no Neli Abaĝieva diris al mi:

— Miaj amikoj, mi estas esperantistino. Ĉiujare Universala Esperanto-Asocio organizas Universalan Kongreson. Ni, esperantistoj, alvokas la homojn el la tuta mondo al paco kaj amikeco. Dum tiuj kongresoj oni organizas literaturajn konkursojn. Mi proponas al vi partopreni en la ĉi-jara Literatura Konkurso. Ĝi okazos en Londono, Britio.

— Sed, ni ne estas esperantistoj, niaj verkoj ne estas pri Esperanta temo.

— Ne gravas, amikoj! La ordinaj homaj sentoj, interpretitaj per emocio kaj varmo, kortuŝos kaj ĝojigos ĉiun homon. Tiu estas la celo de la Esperanto-movado.

Neli Abaĝieva parolis sincere, kaj ŝi sukcesis konvinki nin.

Konata esperantistino tradukis du miajn rakontojn kaj mi sendis ilin laŭ la konkursa adreso.

La kongreso en la brita ĉefurbo finiĝis. Mi ne estis premiita. Sed, aŭtune de 1985 mi ricevis leteron. Ĝi estis de malproksima Skotlando. Mia tuta familio estis emociita — panjo korespondas kun Skotlando!

Tio estis mia unua renkontiĝo kun Esperanto. Iu homo el malproksima Skotlando skribis al mi. En Esperanto! Bedaŭrinde, mi ne povis kompreni la leteron.

Mia konatino denove helpis, tradukinte ĝin.

— Al vi skribas s-ro William Auld el Britio — kaj ŝi rigardis min mirigite.

— Ĉu, vi scias, kiu li estas? — ŝi demandis.

— Mi ne scias kiu estas tiu ĉi homo, — mi respondis.

— S-ro William Auld estas el la

numero de plej eminentaj esperantistoj nuntempaj, verkinto kaj redaktoro de kelkaj Esperanto-gazetoj. Jen kia homo skribas al vi!

Kiaj agrablaj vortoj! Al emerita kemiistino kiel mi, estis permesite eĉ ekplore. Jen estas la teksto de tiu letero:

„Kara samideanino,

Se vi nenion havas kontraŭ tio, mi deziras aperigi en unu el la venontaj numeroj de la revuo „MONATO“ vian trefan rakonton „Gasto“. Antaŭdankon. Tre kore via W. Auld 1985.11.04“

Mi tralegis ankoraŭfoje la leteron kaj io ektintis en mia animo. S-ro W. Auld turnas sin al mi per la vortoj „Kara samideanino!“ Por li mi estas samideanino, mi estas esperantistino... sed, mi fakte ne estas. Tio estis granda eraro! Sed, feliĉe, korektenda! Mi decidis lerni Esperanton, por fariĝi vera esperantistino. Alie mi ne povus skribi denovo al s-ro Auld.

Tiel mi komencis lerni Esperanton. Mia unua instruistino estis Ljubka Mandalova.

Kiam ni en la kurso jam povis iomete paroli Esperante, ŝi demandis nin — kial ni lernas Esperanton? Tiam mi rakontis al ŝi kaj al miaj samkursanoj mian historion.

Ĉiuj estis agrable surprizitaj. Tio estis en la printempo de 1986. Baldaŭ mi finis la unuagradan kurson.

En la somero de 1986 mi ricevis numerojn 4, 6 kaj 7 de revuo „Monato“. Sed numero 5 mankis. En la aliaj numeroj mia rakonto „Gasto“ ne estis. Eble ĝi aperis en la perdiĝinta n-ro 5/86? Mi ne povis ekscii tion. Mia granda ĝojo malheliĝis.

Poste mi pasis la duan kaj la trian gradojn de la esperantlingva kurso. Mi havas jam tri diplomojn pri mia klereco en Esperanto. Mia unua E-

libro estas „Poemoj por Paco“ — eldonita honore al la Internacia Jaro de Paco—1986, ĝin donacis al mi mia E-instruistino Ljubka Mandalova.

Tie mi vidis kaj tralegis la poemon „La paco eblas“ de W. Auld:

„... militon for, kunvivo en tolero.“

Mi proponis ĝin al revuo „Bulgara Esperantisto“, ĝi estis aperigita en ĝia kajero 7/1987. Mi sendis al s-ro W. Auld unu ekzempleron de tiu numero kun lia poemo.

La 1987.08.24 en Skotlando estis skribita la respondo:

„Estimata samideanino!

Bonvolu akcepti mian sinceran dankon, pro la sendita ekzemplero de „BULGARA ESPERANTISTO“, kun mia poemo. Tiu presigo vere honorigas min, kaj mi estas tre dankema al la respondeculoj.

Tre kore via W. Auld“

Pli malfrue mi tralegis ankaŭ lian poemon „la perdita junco“, pri temo el la tempo de la Dua Mondmilito.

Tio estis mia dua animskua renkontiĝo kun s-ro W. Auld, kaj ĝi instigis min skribi mian rakonton „Ni ne toleru plu!“ Kiu aperis en n-ro 12/88 de „BE“.

Mi estas senfine dankema kaj pro la unua kaj pro la dua miaj renkontiĝoj kun s-ro W. Auld — dank’ al Esperanto.

Nun mi estas vera esperantistino. Mi konvinkiĝis, ke la Esperanto-movado kaj la lingvo mem estas io tre granda.

Dankon al ĉiuj, kiuj enkondukis min en Esperanton!

Joanna KONSTANTINOVA,
Sofio

RENKONTIĜO EN VARNA

Kara gasto de la esperantistoj en Varna estis Violin Oljanov, membro de la Akademio de Esperanto kaj aŭtoro de multaj diversspecaj E-eldonoj. La renkontiĝo kun la eminenta bulgara esperantisto gvidis doc. Georgi Dimov, konata veterano de la E-movado en Varna.

La gasto, pasiginta parton de sia vivo en Varna, donis valorajn konsilojn pri la kolekto de konvenaj materialoj kaj konsultado

de fontoj lige kun la antaŭstaranta verkado de „Historio de la E-movado en Varna“, kiu ampleksos 80-jaran periodon.

La sincera interparolo kreis agrablan etoson kaj inklinigis Valja Viĉeva, Veska Skolufanova, Ĥristo Cvetkov, Cvjatko Jolov k. a. rakonti pri la vivo kaj agado de la E-societo antaŭ pli ol 40—50 jaroj.

Inĝ. Nikolaj KULEV,
esperantisto-veterano

Pri la naturo de Zamenhofa mondkoncepto (1879—1885)

CANKO MURGIN

(Daŭrigo de n-ro 2/1989)

8. ZAMENHOF MALPROKSIMIĜAS DE LA CIONISTOJ KAJ REPRENAS SIAJN PLANLINGVAN KAJ VERKAN LABOROJN.

La sobraj rezonado, atentigo kaj konsilado fare de I. L. Levin (N. Jehalel = Lehalel) efikis bonfare sur Zamenhof kaj liajn kolegojn el la Universitato. Zamenhof eliris el la narkoto de cionismo-klerikalismo kaj ekpaŝis sur la vojo de realismaj konsidero kaj reaprezo pro la valoro de sociaj aferoj. Tamen li faris promeson, kiu fakte engaĝis lin por elmigro al Palestino. Zamenhof ne povis havi abruptan konduton. Iom post iom li maloftigis kaj poste ĉesigis la kontaktojn kun cionistoj kaj klerikoj, kaj fine li liberiĝis el la platformo de cionismo kaj el la influo de juda klerikalismo.

Jam kiel studento en la Universitato de Moskvo (1879—1881) Zamenhof estis altira objekto pri varbado fare de cionistoj kaj fare de revoluciaj demokratoj (tiamaj rusiaj socialistoj). Li ŝatis resti ekster la sfero de politiko, revis krei tute novan sferon de agado por unuigo de la nacioj en koheran harmonian homaron per enkonduko de tute novaj lingvo, literaturo k. a. laŭ novaj politika pensado, humanisma sentado kaj universala etiko. Sendube, en la komenco kaj longe post tio, Zamenhof estis ekstrema utopiisto, li estis flugilhava fantaziulo, li estis feliĉa Ĉasanto de Ĥimeroj, sed bonŝance, li havis sanan menson, bonan kordon, belan intencon kaj senlace laboris dum sia tuta vivo por efektiviĝi siajn Utopion, Fantaziaĵon, Ĥimeron... Kaj li ne agadis kaj ne laboris en solo. Zamenhof frue trovis disĉiplojn el diversaj nacioj kaj lingvoj, el diversaj filozofioj kaj religioj, el diversaj klasoj kaj profesioj, sed ĉiuj kunigitaj de unu idealo — fervore labori por la tuta homaro.

La vivo kuris monotone. Ĉiam Zamenhof estis duoble ŝargita de laboro en 1876—

1887. Dum lernado en gimnazio, dum studado en Universitato, dum praktikado de kuracista profesio kaj dum specialiĝo en oftalmologio — li okupiĝis seninterrompe kaj paralele pri lingvoj, lingvistiko, lingvo-konstruado de Neŭtrala Lingvo Internacia. Kiel mi jam substrekis, post kelkaj internaj konfuzoj en Zamenhof aperis dubo kaj hezitado pri la valoro de hebrea naciismo — la cionismo. Zamenhof sin sentis patrioto kaj internaciisto. Li, laboranta jam pli ol sep jarojn por trovi instrumenton por realigo de komunehoma ideo, ne povis esti ŝovinisto. Finfine li rompis ĉiujn interrilatojn kun la cionist-klerikala organizo, semanta malamon inter la nacioj.

Subite lia vivo-ritmo estis interrompita de letero el Palestino, kiun li ricevis en la aŭtuno de 1883. Zamenhof respondis la 18-an de novembro 1883. La originalo de lia letero-respondado estis malkovrita antaŭ dudeko da jaroj en Cukerman-arkivo, kolonio Gedera, sude de Jafo, Israelo.

En tiu letero Zamenhof rakontas, ke kiam delegitoj el Ĥarkovo vizitis lin en Varsovio (1882) por varbi elmigrontojn al Palestino, ili vekis grandan intereson ĉe li kaj li eĉ pritraktis la eblecon elmigri. Plue Zamenhof emfazas en sia letero, ke li iam kredis pri sukcesa starigo de kolonio(j) en Palestino, sed nun la unuaj elmigrintoj senrevigis lin. Bedaŭro, pro manko de sukceso, obsedis la tutan hebrean popolon en Rusio. Kaj Zamenhof konsilas pri pluaj klopodoj por starigo de kolonio(j) kaj konkludas, ke nur tiamaniere la elmigrintoj povus regajni la amon de sia popolo (tiun informon mi ricevis de Dimitro Ĥaĝiev, eksdiplomato kaj nun prezidanto de la Bulgara Sekcio de Mondpaca Esperantista Movado.

Informo pri fondo de la unua kolonio „Gedera“ venis apenaŭ en decembro 1884 t. e. post du jaroj kaj duono ekde la alveno de elmigrintoj el Rusio. Zamenhof trankvili-

ĝis. La unua grupo de elmigrintoj starigis sian domon en Palestino. Plue, Zamenhof interesiĝis pri ĉiuj nacioj, pri ĉiuj minoritatoj, pri la tuta homaro, inkluzive hebreojn, sed ne ekskluzive...

En januaro 1885 Zamenhof ricevis promocion de kuracisto. Li jam pripensadis kie komenci praktikadon de sia profesio. En februaro 1885 venis letero de Fania, lia fratino. Ŝia edzo estas serioze malsana kaj bezonas kuracadon. Ŝi invitis sian fraton gastigi ŝian familion. Zamenhof ne povis rifuzi. La malsana Aleksandro Pikover, edzo de Fania, estis universitata kamarado de Zamenhof. Fine de februaro 1885 Zamenhof alvenis en Vejseje, vilaĝo en Litovio, kie loĝis la familio de Aleksandro kaj Fania Pikover.

Zamenhof luis du ĉambrojn kaj malfermis ambulatorion. Klientaro nemultnombra, sed sufiĉa por komencanta kuracisto. La vilaĝo kvazaŭ estis dense sieĝita de kamparo, herbejoj, lago, arbaro. Kiom da natura beleco estis koncentrita tie! Nur post kelkminuta piediro Zamenhof estis ekster la vilaĝo. Plua kelkminuta piediro kaj li estas en la sino de freŝa Naturo. Dum sia kvarmonata restado en Vejseje Zamenhof veturis kelkajn fojojn per ĉevala kaleŝo al u. Kovno. Sur la fono de Vejseje, Kovno kaj ir-revena vojo inter ili Zamenhof verkis siajn komencajn du poemojn „Ho, Mia Kor’!“, en kiu li dialogas kun sia koro kaj „Mia Penso“ — sincera konfeso pri suferoj kaj sukceso en finpretigo de la Unua Libro, en rusa lingvo. Zamenhof revenis en Varsovio en junio 1885. La menciitaj du poemoj, originale verkitaj en Esperanto, estas la laste verkitaj tekstoj por la Unua Libro (1887), kiu atendis du jarojn ĝis oni trovis eldoneblecon.

La 29-an de julio (10-an de aŭgusto) 1885 kune kun kvar aliaj hebreoj el Varsovio Zamenhof subskribis gratul-leteron okaze de 25-jara verkista agado de J. L. - Levanda (en u. Vilno):

„Ni gratulas Vin je la tago de via literatura jubilea festo. Por plori pri niaj suferoj estu ŝakalo, kaj kiam ni revos pri revenigo de niaj forkaptitoj — estu harpo por niaj kantoj“. Tio estas la lasta cionismaĵo de D-ro L. L. Zamenhof.



El la serio „Naturo“. Aŭtoro Petăr KATRANKIEV — Vraca. La foto gajnis duan premion en la ILEF-konkurso 1988.

„Bulgara Esperantisto“ — antologio de bulgara literaturo



Dum sia 70-jara ekzistado revuo „Bulgara Esperantisto“ senlace strebis konigi al siaj legantoj la bulgaran literaturon. Rigardante trans la jardekojn ni konstatas, ke la revuo objekte prezentas ampleksan, riĉenhavan antologion de la bulgara literaturo. Sur ĝiaj paĝoj estas prezentitaj preskaŭ ĉiuj signifaj aŭtoroj — de la klasika periodo ĝis nia tempo. La ideo pri aperigo de tradukoj el la bulgara literaturo ne apartenas al „Bulgara Esperantisto“. Ĝi heredis kaj daŭrigis tiun tradicion de siaj antaŭuloj — la landaj Esperantaj eldonoj „Rondiranto“, „Unua Paŝo“, „Lumo“, la komuna bulgararumana E-revuo „Danubo“, kie tradukoj el la bulgara literaturo abundas.

En unua kaj dua numeroj mankas literaturaĵoj. En tria numero aperis la versaĵo „Izolita sur monteto for“ de Penĉo Slavejkov, en traduko de Atanas D. Atanasov-Ada sub la pseŭdonimo Snteplum. La dua ero estas „Malriĉa domo“, fragmento el pli granda rakonto de Ivan Vazov, en traduko de Georgi Fandâkov en numero 7—8. Sekvis eroj de Stojan Miĥajlovski, Konstantin Veliĉkov, kaj denove Vazov. Do en la unua jarkolekto trovis lokon 5 verkoj de 4 aŭtoroj. En la komenco de la dua jarkolekto la redakcio klare programas presigi „elektitajn pecojn el la bulgara literaturo en Esperanta traduko“. Ankaŭ en la dua jarkolekto la prezentitaj aŭtoroj estas 5, sed venas novaj nomoj — P. R. Slavejkov, Ĥristo Botev,

Elin Pelin. En la sekvantaj kelkaj jarkolektoj aperas verkoj de P. K. Javorov, Dimĉo Debeljanov, Canko Cerkovski, Nikolaj Rajnov, Emanuil Popdimitrov. Eĉ en la jaroj de kruela faŝisma teroro la zorgemaj tradukantoj provas prezenti la proletan poeton Ĥristo Smirnenski, la kantistojn de la glora Septembra Ribelo — Asen Razcvetnikov kaj Angel Karalijĉev, la pereintan en la batalo Ĥristo Jasenov.

La bunteco kaj la abundeco de literaturaj verkoj instigis la tiam junan, poste elstaran Esperantan poeton Asen Grigorov deklari: „De kelkaj jaroj mi kun granda intereso sekvis la disvolviĝon de nia organo. La unuaj paĝoj en Esperanto, kiuj vibrigis mian animon por enamigi ĝin al nia lingvo kaj ideo — tio estis la literaturaj paĝoj de „Bulgara Esperantisto“. Foliumante ilin, mi sentis kiel io hejma kaj intima kaj proksima — io tamen granda kaj majesta alblovas min kaj potence kaptas mian koron. Mi tie mire rigardis la figurojn de konataj karaj poetoj bulgaraj, modeste, sed bele kaj digne prenantaj parton en la vasta internacia kunvivo intelekta de ĉiuj nacioj. Mi per la bulgara poezio esperantigita sentis hejma ankaŭ la internacian lingvon mem, ĝian poezion kaj literaturon.“

Inter ĉiuj malnovaj jarkolektoj reliefigas jarkolekto sepa (1925—1926). Tiutempe BEA iniciatis la eldonadon de bulgarlingva propaganda semajna gazeto „Esperanto“ kaj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ decidis doni al la gazeto precipe literaturan karakteron. Sur ĝiaj paĝoj per multaj eroj kaj detalaj biografiaj skizoj estis prezentitaj tri verkistoj — Dimĉo Debeljanov, Ĥristo Botev kaj Nikolaj Rajnov. En tiu jarkolekto trovis lokon ankaŭ tradukoj el la verkaro de la junaj, poste elstaraj poetoj Atanas Dalĉev kaj Dimitâr Panteleev. La bulgara literatura scienco estis prezentita per la artikolo „La taskoj de la literatura kritiko“ de prof. d-ro Ivan D. Ŝiŝmanov.

La sekvantaj du jarkolektoj ŝanĝis sian

formaton kaj ankaŭ sian karakteron. Ape-
rantaj en duonjurnala formato, ili enhavis
precipe propagandajn artikolojn en bulgara
lingvo, sed inter la malmultaj tradukoj el-
staras ĉapitro el la poemo „Sanga Kanto“
de Penĉo Slavejkov kaj la unua traduko de
versaĵo de Elisaveta Bagrjana, poste esti-
ĝinta fiero de la bulgara poezio. Tio estas
la unua traduko de verko de tiu poetino en
fremdan lingvon. En la du jarkolektoj, ape-
rantaj en u. Ruse (deka kaj dekunua,
1928—1930) prenintaj jam sian kutiman
formaton, troviĝas kontentiga kvanto da
tradukoj de bulgaraj aŭtoroj. Novaj nomoj
estas Ljudmil Stojanov, Geo Milev, Nikola

Furnaĝiev, Vladimir Poljanov, Konstantin
Konstantinov, Ljuba Kasárova.

La reveno de la revuo en Sofion en ĝia
dekdua jarkolekto (1930—1931) koincidas
kun kuraĝa asocia iniciato — la eldonado
de komuna balkanlanda gazeto „Balkana
Konkordo“, kun multaj tradukoj el la bulga-
ra literaturo. Tiu jarkolekto „Bulgara Espe-
rantisto“ aperas tre magra — 4-paĝa, sen
literaturaĵoj. La sekvantaj du jarkolektoj
aperis iom pli amplekse kaj enhavis iom da
tradukoj. Revigliĝo sentiĝas ekde jarkolek-
to dekkvina (1933—1934). Ĝis la malper-
meso de la revuo en 1942, paralele kun la
jam prezentitaj aŭtoroj aperis novaj nomoj,



ANTAŬSTARANTA LABORO


*La Esperanto-movado, la interna-
cia kaj la landa, ĉe ni kaj ĉie alie,
havas ĝenerale du flankojn: ekste-
ran kaj internan.*

*La unua el ili — la publika propa-
gando — ĝis nun almenaŭ ĉe ni es-
tis tre bone prizorgita. Tio estas
konstatebla per la faktoj mem:
sukcesoj kaj akiraĵoj ĉe oficialaj ins-
titucioj, nombro de kursoj, de nove-
fonditaj grupoj, nombro de venditaj
lernolibroj kaj de aliaj esperantaĵoj
ktp. Sukcesoj, pri kiuj ĉiu el ni ĝo-
jas.*

*Nun — ni turnu nian rigardon al
nia interno. Ni vidu, kia estas la sta-
to de la organizaĵo, la intersamidea-
na kaj la grupa vivo, la meza nivelo
de la lingva posedo, la literatura
agado (sendube la lastaj du laŭ
signifo estas la plej gravaj). Ĉu la
intenseco de nia interna vivo en
komparo kun la eksteraj almlitaĵoj
estas kontentiga? Kaj ĉu la ĝusta
proporcio inter ili estas konservi-
ta? — Ankoraŭ ne!*

*La interna vivo mem de nia mova-
do en Bulgario havas du malsamajn
branĉojn: organizo kaj kultura aga-
do. La nesufiĉe vigla vivo en la so-
cieto aŭ pli ĝuste — en la grupoj,
ŝajne estas sentita de la ĉi-lastaj.
Pruvo: la lastatempe neatendite
multnombraj Esperanto-konferen-
coj en la tuta lando. Jen estas rime-
do, kiu trafe forigas la rigidecon kaj
la anemian aspekton en la societa
vivo.*

*La plej grava manko, eĉ danĝero,
estas la neĝusta traktado de la esen-
co de nia lingvo mem.*



*Ekzistas du specoj de esperantu-
lo: esperantano kaj esperantisto.
Oni ne intermiksi ilin. La unua estas
simpatianto, kunhelpanto, li mem
ne posedas la lingvon, ofte ne havas
la eblecon lerni ĝin, sed helpas la
agadon de la esperantistoj laŭpove:
li subtenas la lokan grupon per mo-
no, aliĝante kiel membro, li eĉ abo-
nas Esperanto-gazeton, nur por hel-
pi ĝian disvastiĝon. Kaj... nur tio.*

*La unua nepra kondiĉo, por ke
oni estu esperantisto, estas la scipo-
vo de la lingvo. La vastigon de la
lingvo celas nia movado. Ĉio alia*

*venas per si mem. Ja homo, kiu pa-
rolas, kiu praktikas la lingvon, estas
vivanta propagandilo, vivanta bro-
ŝuro, vivanta reklamo. Nenio pli efi-
ka, nenio pli impona ol tiu reklamo.
Vortoj sen vivantaj ekzemploj, paro-
loj ne akompanataj de faktoj, de
realaĵo — ne konvinkas.*

*Ĉe ni en Bulgario bedaŭrinde
dum la lasta tempo abundegas la
esperantanoj, kaj ne la esperantistoj.
Mi legas la vortojn de bona sami-
deano, kiu skribas pri unu el niaj
konferencoj:*

*„... Malagrabla surprizo estis, ke
la lingvo ne estas bone scipovata.
Korektan parolon mi aŭdis nur de
du personoj... Hodiaŭ la alfluo de
nefininstruitaj esperantistoj estiĝis
tiel granda, ke eĉ ne en unu konfe-
renco ni povas aŭdi korektan Espe-
rantan parolon. Por forigi tiun man-
kon, oni devas fari maksimumon da
laboro...“*

*Samideanoj, ni faru tiun laboron!
Nun, kiam venas la somero, la
morta sezono por propagando kaj
por kursoj, kaj kiam la plimulto el ni
ĝuos iom da ripozo dum la somera
feriado, ni turnu nian atenton al ni
mem. Ni freŝigu kaj riĉigu niajn
lingvo-konojn, ni havigu al ni Espe-
rantan legaĵon — librojn kaj gaze-
tojn — ni streĉu niajn fortojn dum
la libertempo somera por forĝi el ni
esperantistojn!*

A. GRIGOROV

(El „Bulgara Esperantisto“ n-ro 9,
1926)

inter kiuj ankaŭ proletendencaj — T. G. Vlajkov, Sv. Minkov, N. Marangozov, Atanas Duškov, Maria Grubešlieva, Nikola Lankov, Orlin Vasilev, Bogdan Ovesjanin, Vasil Vodeničarski.

Post la liberigo de la lando elsub la faŝisma reĝimo en 1944, Bulgara Esperantista Asocio tuj restariĝis kaj en la somero de 1945 komencis la eldonadon de grandformata monata revuo „Internacia Kulturo“, kiu anstataŭigis „Bulgara Esperantisto“. Ĝia eldonado rekomenciĝis en 1946, kiel pure organiza organo de Bulgara Esperantista Asocio kaj Bulgara Esperantista Kooperativo kaj aperadis nur du jarojn. Dum tiu periodo en ĝi mankis literaturaĵoj.

„Bulgara Esperantisto“ komencis aperi denove en 1957 post la periodo de stagnado en nia movado. Ĝi estis tre modesta, stencilita, sed malgraŭ tio ĝi aperigis tradukojn el la bulgara literaturo. Jam ekde la sekva jaro la revuo ekaperis presforme kaj la tradicio aperigi tradukojn el la bulgara literaturo daŭris kaj rimarkinde plivastiĝis. Oni tradukis ne nur klasikulojn kaj jam eminentajn aŭtorojn. Tre atente la redakcio elektis ankaŭ el la novaj verkoj de la periodo post 1956 — ĝis la nunaj tagoj. Se oni elnombrus ĉiujn nomojn, la vico fariĝus tre longa, do ni menciuj nur parton de ili: G. Ĝagarov, Pavel Matev, Najden Vâlĉev, Liljana Stefanova, Penju Penev, Stanka Penĉeva, Marko Nedjalkov, Orlin Orlinov, Evtim Evtimov, Nadja Keŭlibarova, Damjan Damjanov, Vladimir Baŝev, Vanja Filipova, Ivajlo Balabanov, Stefan Ĉirpanliev.

Do ni provu bilanci la rikolton sur tiu kampo. Dum sia 70-jara ekzistado „Bulgara Esperantisto“ prezentis 157 aŭtorojn (35 nomojn ni ellasas kiel sensignifajn) kun 562 eroj. Necese estas emfazi, ke 34 eroj el tiu nombro estas represitaj kaj 26 eroj havas po du aŭ pli da tradukoj sur la paĝoj de la revuo. La statistiko montras, ke plej ofte tradukata aŭtoro estas Penĉo Slavejkov — 30 eroj (kun 8 represoj kaj 2 tradukoj, de malsamaj personoj), Ivan Vazov — 28 eroj (3 represoj, 3 tradukoj de diversaj personoj), Elin Pelin — 18 (3 tradukoj de diversaj personoj), Ĥristo Smirnenski — 17 (5 represoj), po 15 tradukoj — P. K. Javo-

rov kaj Nikolaj Rajnov, 14 — Mladen Isaev, 12 — D. Debeljanov, 10 — Ĥristo Jasev, po 9 — Dora Gabe, Nikola Vapcarov, Veselin Hanĉev, Nikolaj Zidarov. Al la supremenciita nombro de 562 eroj oni devas aldoni ankoraŭ 44 folkloriaĵojn — 37 popolkantoj kaj 7 popolfabeloj. Tiel la nombro de eroj el la bulgara literaturo sur la revuaj paĝoj atingas 608. Ĉu estas multe aŭ malmulte por unu organo de nacia Esperanta organizaĵo?

La tradukoj estas ĝenerale altkvalitaj. Iu samtempulo ekzemple asertis, ke la tradukoj de Ivan Dobrev el la Botev-poezio egalas al la originalo. Kiu tradukis? Preskaŭ ĉiuj el kelkaj generacioj de esperantistoj kun literaturaj kapabloj — elstaraj kaj tute modestaj. Inter la elstaraj ni montru la nomojn de Ivan H. Krestanov, Panajot At. Kolev, Ada, Georgi Atanasov, Georgi Fandâkov, Geo Hârŝev, Petâr Jordanov, Ivan Dobrev, Dimitâr Zlatarski, Asen Grigorov, Zaĥari Zaĥariev, Ĥristo Gorov, Simeon M. Simeonov, Simeon Hesapĉiev, David Sasonov, Stojan Ĝuĝev, Ivan Sarafov, Stefan Kiraĝiev, Atanas Lakov, Zora Mladenova-Hans, Stefan Masârov, Violin Oljanov, Stefka Ĥristova, Canko Murgin, Dimitâr Haĝiev, Venelin Mitev, Kunĉo Vâllev, Lidia Raeva, Ljuba Bojaĝieva. Entute 101 bulgaraj esperantistoj tradukis por la gazeto. Menciindas, ke la gazeto aperigis du tradukojn el la bulgara poezio, faritajn de eksterlandanoj — de K. Kalocsay kaj Nadija Andrianova. La unua istas represo el „Bulgara Antologio“, kaj la dua — tradukita speciale por „Bulgara Esperantisto“.

Denove ni ĵetu rigardon al la statistiko. Plej multajn tradukojn faris Asen Grigorov — 52, sekvas Stefan Kiraĝiev — 47, Simeon M. Simeonov — 45, Ivan Dobrev — 33, Atanas Lakov — 28, Dimitâr Haĝiev — 23, Ivan H. Krestanov — 21, Venelin Mitev — 16, Geo Hârŝev — 15, Kunĉo Vâllev — 14, Ĥristo Gorov — 12.

Konklude ni ŝatus ripeti niajn komencajn vortojn. „Bulgara Esperantisto“ prezentas efektive ampleksan, riĉenhavan antologion de la bulgara literaturo.

Krăstju KARUCIN

En numero 221 de la 3-a de decembro 1924 la semajna gazeto „*Esperanto Triumfonta*“ (poste „*Heroldo de Esperanto*“) aperigis korespondadojn pri la propaganda verda semajno, organizita de bulgaraj esperantistoj por tria fojo en novembro de la sama jaro. Ĝin verkis nia estimata veterano Dimităr Simeonov, tiama sekretario de BEA kaj speciala korespondanto de la gazeto por Bulgario. Kiel korespondanto de „*Esperanto Triumfonta*“, li estis akceptita membro de la Societo de Fremdaj Journalistoj en Bulgario.

La redakcio alte pritaksis lian korespondadojn kaj presigis per grandaj literoj aldonan titolon: „*Universala verda propaganda semajno. Konsiderindaj proponoj de bulgaraj esperantistoj.*“

Ni opinias, ke la proponita materialo estas interesa por konatiĝo kun la historio de la E-movado en nia lando.

La „verda“ semajno

Jam pasis la tria propaganda semajno en nia lando. La samideanoj eksciis per „*Esperanto Triumfonta*“ (ET) pri tiu nia aranĝo kaj pri la sukcesoj atingitaj de la du antaŭaj. Ili ankaŭ scias, ke ni havis grandajn esperojn je „verda“ semajno. Pri ĝi oni legu la koncernan artikolon en la hodiaŭa n-ro de ET. La rezultoj atingitaj dum la ĵus pasinta „verda“ semajno nin igas tute optimistaj pri la estonto de nia movado kaj jam nun ni vidas iujn revojn efektivigitaj.

Ĉar sciigoj pri la agado de la samideanoj en la provinco mankas ĝis tiu momento, mi parolas nur pri la propagando en Sofia.

Unu semajnon antaŭ la komenco de la „Semajno“ (2—9 novembro) 15 divers-tjektaj afiŝoj, ĉiu kun eldonkvanto de 1000 ekz., kelkaj alvokoj kaj 10—20 000 ekz. de malgrandaj flugfolioj estis finpresitaj. Ĉio estis dissendita en la provincon al la esperantistaj grupoj kaj apartaj agemaj samideanoj.

Dimanĉe, 2-an de no-

vembro, la plej granda universitata aŭditorio estis plenplena de homoj. La kunvenon prezidis universitata profesoro D-ro Josif Fadenheht. Parolis s-noj At. - D. Atanasov, G. Aktarĝiev kaj la fremdlandaj samideanoj Hugo Bär (germano) kaj Eugeni Waghy (hungaro). La paroladoj, precipe de la alilandanoj, tradukataj bulgaren, impresis bonege.

Antaŭ la kunveno aeroplano flugis super la urbo disĵetante propagandajn flugfoliojn kaj sciigojn pri la kunveno.

Dua granda publika kunveno okazis sabate, 9-an de novembro, organizita de la Akademia Esperanta Grupo. Parolis At. D. Atanasov kaj G. Vartolomeev. Ĉe granda entuziasmo prenis la parolon profesoro D-ro Ivan Ŝiŝmanov. Tria kunveno okazis dimanĉe sub la prezido de prof. Miĥail Arnaudov. Parolis Sim. Petkov, Petr Jordanov, St. Minkov pri UEA kaj s-ino Lidia Ŝiŝmanova pri la XVI Kongreso kaj pri la naciaj kongresoj en Ruse kaj Arad.

Post la kunveno ĉirkaŭ 50 esperantistoj kune tagmanĝis en la vegetarana restoracio.

Dum la semajno okazis trileciona senpaga kurso, en kiu At. D. Atanasov prezentis al multnombra publiko per klarigaj bildoj la skemon de la lingvo. Tuj post la fino de la semajno, la 10-an de novembro komenciĝis oficiala dumonata kurso kun pli ol 70 gekurŝanoj.

Okaze de la „verda“ semajno, ĉiuj tagĵurnaloj raportis pri Esperanto, kelkaj publikigis grandajn artikolojn. Pri Esperanto ekparolis eĉ humuraj gazetoj.

Pri la agado en la provinco oni povas nur supozi. La grandaj mendoj de propaganda literaturo kaj de lerniloj estas bonega montrilo, ke ankaŭ tie ekbolis propagando tre vigla, pli vigla kaj pli sukcesa ol kiam ajn ĝis nun.

Jam trian fojon ni propagandas laŭ tiu metodo kaj ni estas tre kontentaj pri la atingitaj sukcesoj. Oni jam ne plu silentas pri Esperanto, oni ne primokas ĝin, sed oni aŭ laŭdas aŭ kontraŭparolas, sed tamen parolas. Ĉar oni vidas, ke Esperanto estas forto, ke post ĝi staras armeo.

Estus do domaĝe, se plej baldaŭ ĉiuj Esperanto-societoj en la tuta mondo ne alprenus tiun batalmetodon, aplikante ĝin konforme al la lokaj cirkonstancoj.

Samideanoj, sekvu nian ekzemplon por la bono de nia movado! La estonto de nia movado estas en niaj manoj!

D. SIMEONOV

PRI LA INDIVIDUA PROPAGANDO

En la bone argumentitaj artikoloj „Konstanta kaj efika informado necesas” de Nikola Nikolov kaj „Kiel varbi la junularon” de Ljubomir Trifončovski en „Bulgara Esperantisto” (n-ro 6/1988) estas pritrakitaj diversaj formoj de informado kaj propagando de Esperanto. Estas emfazitaj apartaj formoj.

Mi konsentas kun ĉio dirita en ili. Sed en ili ne estis menciita la rolo de la individua propagando, kiu laŭ mi restas ĉiam unu el la plej efikaj formoj de propagando. Ĉe tiu ĉi formo estas persona kontakto kun la objekto de la informado kaj propagando kaj ĝi ebligas dialogon inter propagandanto kaj objekto de la propagando, kio helpas por pli bona klarigo de la tuŝitaj demandoj. La propagandanto povas observi la reagon de sia kunparolanto kaj depende de ili konduki pluen la interparolon. La efiko de tiu ĉi formo de propagando dependas de la lerteco, erudicio kaj konvinkebleco de la propagandanto. Ekzemple, mi estis varbita kiel esperantisto per persona informado, kiu okazis en tute natura konversacio kun mia instruisto de muziko kaj stenografio Dimităr Haĝiivanov en Drjanovo antaŭ kvindek jaroj, kiam mi estis lernanto en kvina (nuna naŭa) klaso. Antaŭ tiu ĉi konversacio mi sciis ion pri Esperanto, eĉ estis trafoluminta lernolibron de Esperanto, sed tio ne sufiĉis por interesigi min pri la lingvo kaj ne instigis min al ties lernado. Tamen la informoj, kiujn mi ricevis en tiu ĉi konversacio, tuj flamigis en mi deziron lerni Esperanton. La saman efikon havis la konversacio ankaŭ rilate miajn samklasanojn kaj amikojn Neno Janev (bone konata Esperanto-aganto) kaj Botju Penev (pereinta poste en la batalo kontraŭ faŝismo). La sekvan tagon ni ĉiuj komencis lerni Esperanton memstare.

Plej diversaj okazoj povas esti uzataj por apliko de tiu ĉi formo de informado. Tre konvena tiurilate estas la veturado per vagonaro. Ĉar la veturantoj ordinare ne havas ian laboron kaj emas babili kun la kunveturantoj por pasigi la tempon, estas facile provoki interparolon pri la Internacia Lingvo. Motivo povas esti legado de Esperanto-libro aŭ gazeto, aŭ interparolado esperante kun alia esperantisto, kio ofte okazas ĉe grupa veturado al kongreso aŭ aliaj Esperanto-aranĝoj. Mi rememoras jenajn tre instruajn okazojn.

Dum nia veturado per vagonaro kun k-do Kunĉo Vâlev, de Sofio al Ŝumen por partopreni la Esperanto-aranĝojn okaze de la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato, kelkajn horojn ni veturis kun grupo da lernantinoj el Ruse, revenantaj el u. Radomir, kie ili partoprenis ian tutlandan konkurson. Ni ekkonversaciis kun niaj junaj kunveturantinoj kaj tute nerimarkite ni ekparolis pri Esperanto. La junulinoj manifestis intereson pri tiu temo kaj la interparolado estis ege vigla. La informo pri Esperanto, kiun la lernantinoj ricevis de ni, povas esti komparita kun neniuj alia formo de informado kaj propagando.

Revenante el Ŝumen, ni kun k-do K. Vâlev havis la okazon veturi en la sama kupeo kun grupo da instruistinoj el Miĥajlovgrad kaj ni nature komencis konversacion pri Esperanto, kiu daŭris la tutan tempon de nia kuna veturado el kelkaj horoj. Ĉiuj kunveturantinoj montris intereson pri la temo de la konversacio, kio kuraĝigis nin daŭrigi ĝin. Mi ne scias, ĉu iuj el ili komencis lerni Esperanton, malgraŭ ke ili deklaris deziron fari tion, sed mi estas certa, ke ili akiris ege ampleksan informon pri nia lingvo, por fariĝi almenaŭ ĝiaj amikoj.

Mi uzis multajn okazojn por individua informado pri Esperanto de miaj kolegoj en la Ministerio de Eksteraj Aferoj. Bedaŭrinde, ne ĉiam tiu aktivado rezultigas varbadon de novaj esperantistoj. Sed la informado almenaŭ kontribuas por pli bona informiteco de la publiko kaj tio ankaŭ estas bona rezulto. La informado tamen devas esti dozita kaj objektiva. Alimaniere ĝi povus havi kontraŭajn rezultojn por Esperanto.

Lige kun la informado kaj propagando pri Esperanto mi deziras tuŝi la demandon pri sociologia esplorado de la efiko de iliaj diversaj formoj. Mi ne havas informon, ĉu simila esploro estis farita. Mi proponas jenan formon de enketado: en la enketkarto, kiun plenigas ĉiu nova kursano, estu demando: „Kiel vi estis varbita lerni Esperanton kaj kia estas via motivo pri lernado de Esperanto?” La resumo kaj la analizo de la respondoj al tiu ĉi demando ebligas fari interesajn konkludojn pri la efiko de la diversaj formoj de poresperanta informado kaj propagando.

Dimităr HAĜIEV

Instruado de matematiko

La 4—5.11.1988 en urbo Eger, Hungario, okazis Internacia Matematikista Konferenco pri temo „Metodikaj problemoj en la instruado de matematiko“.

Organizis la konferencon la Eger'a organizaĵo de la Asocio de Matematikistoj en Hungario je la nomo de Janoŝ Bollai. Partoprenis matematikistoj el Hungario, Bulgario, Ĉeĥoslovakio kaj GDR.

La prelegon de la bulgaraj matematikistoj Ljudmila Ar-

naudova kaj Petko Arnaudov pri temo „Koordinata metodo en la spaco (ĉe solvado de stereometriaj taskoj)“ prezentis esperantlingve Petko Arnaudov. Evidentiĝis, ke ĉirkaŭ kvarono de la partoprenantoj en la konferenco scipovas Esperanton. Dank' al la fervora esperantistino Viktoria Balogh, sekretariino de la Eger'aj matematikistoj, la libro entenanta resumojn de ĉiuj 22 prelegoj, estis eldonita en du lingvoj: Esperanto kaj hungara.

La 6-an de novembro en la Esperanto-emisio de la Hungara Radio (Peĉ) estis sciigo pri la konferenco.

La alia bulgara matematikistino, kiu partoprenis la konferencon, scienca kunlaborantino el la Sugestologia Instituto en Sofio Sofija Dimitrova deklaris deziron lerni Esperanton, samkiel pluraj el la aliaj partoprenantoj.

Ĉu speciala komento pri la penetro de Esperanto en fakajn mediojn estas necesa?

Petko ARNAUDOV

Helpe de „Sinclair Spectrum“

En la jubilea jaro de Esperanto mi cerbumis, kiamaniere mi povus kontribui al la disvastigado de la Internacia Lingvo. Mi trovis novan terenon por traplugi kaj semi Esperanterojn. Tiu tereno estas tre vasta: telekomunikado!

Helpe de miaj malgranda (nur 48 K) komputilo **Spectrum**, **VTX5000** — modelo kaj telefono mi povas atingi kelkcentojn da komputilaj sistemoj: t. n. datumbazojn. Mi ne nur legas interesajn sciindaĵojn en iliaj paĝoj; en pluraj mi eĉ rajtas skribi „publikajn leterojn“ al kolegoj — hobiemuloj-komputistoj.

Ekzistas datumbazoj disponantaj pri kelkdek miloj da „ekran-paĝoj“, kiujn la posedantoj ne kapablas mem plenigi. Tamen ili deziras, ke tiuj sistemoj servu al multaj

personoj, do necesas plenigi kiom eble plej multajn paĝojn per interesaj kaj variaj temoj.

Foliumante foje en iu sistemo, mi legis, ke la posedanto (komerca entrepreno) serĉis kunlaborantojn (t. e. inform-liverantojn, I. L.) por kontribui per interesaj legaĵoj. Mi en mia **Spectrum** tuj preparis respondon, kiun mi transsendis kiel datum-komunikaĵon al la „leterkesto“ de la sistemo, destinitan por la sistemgvidanto persone. Mi skribis, ke mi pretas plenigi „kelkajn“ paĝojn pri Esperanto, se li opinias tion sufiĉe interesa temo por siaj „legantoj“. Jam la sekvan tagon mi ricevus telefone la demandon, kiom da paĝoj mi dezirus tiucele. Mi modeste petis kvin. „Tio ne indas, mi disponigas al vi 50, aŭ, se necese, 100 paĝojn“,

estis la respondo. Mi tuj ricevis la necesajn enir-kodojn por la sistemo, kiuj samtempe rajtigas „skribi“ tekston sur la koncernajn 50 paĝojn.

Jen do la puno pro mia aŭdaco: mi devis verki en mia propra komputilo legindan tekston pri Esperanto kaj transsendi ĝin paĝo post paĝo al la datumbazo en Roterdamo. Ĉerpante el multaj dokumentoj kaj varb-broŝuroj, mi verkis tridekon da paĝoj. Mi dividis ilin en ĉapitrojn, kiujn la legantoj helpe de menuo (sur la 1-a paĝo) povas elekti.

Unu el la ĉapitroj havas la titolon „**Hoe klinkt Esperanto?**“ („Kiel sonas Esperanto“). Je mia granda miro mi konstatis, ke tiu titolo instigis la legantojn elekti tiun parton de la teksto pli ofte ol la reston. Oni simple

volis aŭskulti Esperantan prononcadon! Kiamaniere mi scias ion pri la ofteco de konsultitaj paĝoj? Nu, la datumbazo enhavas sistemstatistikon, kiu indikas precize, kiom ofte la paĝoj estas elektitaj. Ĝi eĉ neglektas la enirkodon de la koncerna I. L., do mi mem ne povas falsigi la statistikon pri miaj propraj paĝoj per plurfoja konsultado! La I. L. havas la rajton rigardi nur la statistikon pri sia parto en la sistemo.

Tuj post kiam mi instalas miajn unuajn 30 paĝojn, mi preparis specialan paĝon por

atentigi pri la Esperanto-rubriko. Tiun paĝon mi transskribis al kelkdekoj da aliaj datumbazoj kaj ĝi tekstas „BONAN TAGON!” kun daŭrigo (en nederlanda lingvo) aŭ „Ĉu vi ankoraŭ ne parolas Esperanton? Tiam petu informojn pri la Internacia Lingvo ĉe: (sekvas adresoj de Esperanto-instancoj en Nederlando) aŭ unue rigardu la paĝon 4350 kaj sekvaĵojn en la datumbazo de V. I. S., tel. 010—4332035.”

De datumbazo en tute alia parto de Nederlando mi tuj recevis reagon: „Kial niaj le-

gantoj rigardu en V. I. S? Bonvolu prizorgi ankaŭ en nia sistemo tian rubrikon; tiucele ankaŭ ni volonte disponigos la 50 paĝojn!” Reago, kiun mi tute ne atendis! Kompreneble mi tuj transsendis ankaŭ tien miajn jam pretajn tridek paĝojn.

Dum la sekvaĵoj du monatoj anoncis sin ankoraŭ 2 aliaj datumbazoj pretaj akcepti miajn paĝojn pri Esperanto. Entute mi havas je mia dispono (meze de decembro 1987) 150 paĝojn en 4 datumbazoj; ĉiuj estas tage kaj nokte konsulteblaj. Jen la kompleta listo:

V. I. S.
GGSV
Willem Tell
Kameleon

010—4332035
01883—12475
038—542699
05202—19295

ekde paĝo
ekde paĝo
ekde paĝo
ekde paĝo

4350
2001
12
2750

Iom post iom mi kompletigas en tiuj sistemoj la Esperanto-rubrikon, aldonante novajn paĝojn, aŭ refreŝigante la tekston sur la jam ekzistantaj. Mi ne atendas tuj centojn da kursanoj, sed almenaŭ varbas por nia lingvo per tute nova maniero

en tute nova medio. Kompreneble mia agado kostas al mi multe da mono pro la telefon-kostoj, sed tion mi konsideras modesta kontribuo miaflanke okaze de la jubilea jaro!

Samideanoj, kiuj deziras same agi, povas kontakti

min por ricevi pli da praktikaj informoj, sed nepre notu: mi ne estas teknikisto, sed nur amatoro!

Gerard van der HORST
Hengelolaan 1158
NL—2544 GT DEN HAAG.
Telefona: (0)70-666547
(El „Fokuso”, n-ro 1/1988)

VII ISEU

De la 15-a ĝis la 21-a de julio 1989 en Veliko Târnovo, Bulgario en la loka universitato „Kiril kaj Metodij” okazos la Sepa Sesio de la Internacia Somera Esperanto-Universitato (ISEU).

Prelegos eminentaj bulgaraj kaj alilandaj sciencistoj kaj specialistoj-esperantistoj.

Celo: plialtigo de la ĝenerala kulturo kaj lingva nivelo de la partoprenantoj.

Aliĝkotizo: por fremdlandanoj — 90 levoj, pageblaj surloke, kaj por bulgaroj — 65 levoj, pagado nur per poŝtmandato. La kotizo inkluzivas loĝadon en la renovigitaj studentaj komunloĝejoj, trifojan ĉiutagan man-

ĝadon, interkonan vesperon, eksterurbajn ekskursojn k. a. Ĉiu organizanto de 10-persona grupo partoprenas en ISEU senpage.

Limdato por aliĝo — 30.06.1989.

Aliĝilojn kaj programojn bonvolu peti de: Esperantista societo „Lumo”, P. K. 121, 5000 Veliko Târnovo — Bulgario.

La sama adreso validas por sendado de poŝtmandatoj.

Organiza Komitato



Partoprenantoj en la BEJ-seminario, Pisanica, la aŭtuno de 1988.

Foto: Dimitrička DIMITROVA

BEJ aktiviĝas

Dum la lastaj monatoj la junulara E-movado en Bulgario ekvivis en pli dinamika ritmo. La klubejo de la Centra Esperanta Kulturdomo en Sofio altiras dekojn da junuloj — ili venas por ekscii novaĵojn el vivo de BEA, por aŭskulti muzikon aŭ simple renkontiĝi.

En la klubejon venas lernantoj, studentoj, instruistoj, intelektuloj. La pliparto de ili komencis lerni Esperanton antaŭ nelonge, sed ili jam entuziasme aktivas en la Junulara Sekcio ĉe BEA. Oni fondis Junularan Klubon. Bedaŭrinde, ĝia nove elektita klubestraro ankoraŭ ne povas preni la iniciativon en siajn manojn. Preskaŭ ĉiam la aktivuloj de la klubo proponas improvizitan programon.

Bonan iniciaton havis la membroj de la komunuma E-societo „Espero” kaj ĝia prezidanto Jeĉka Pavlova, kiu klopodis fondi junularan E-klubon „Amikeco” ĉe la Kultura Junulardomo „Lilija Karastojanova”.

Por vigligi la junularan E-movadon oni organizis kelkajn interesajn aranĝojn. Fine de novembro pasintjare en Pleven okazis nacia junulara aranĝo pri problemoj de la esperantistaj someraj internaciaj laborbri-

gadoj en Bulgario. Partoprenis aktivuloj de BEJ, organizantoj de la laborbrigadoj, estraranoj de la Komunuma Komitato de Komsomolo. La renkontiĝo pasis en vigla etoso, kun multe da diskutoj. Estis starigitaj konkretaj taskoj lige kun la orgnaizo de la ĉi-jaraj E-laborbrigadoj.

Fine de decembro pasintjare grupo el 42 personoj, okaze de la Studenta Festo, veturis al IEK en Pisanica. Malgraŭ ke la vetero estis malbona, ni pasis tri belajn tagojn. Ne mankis improvizita kultura programo.

Fine de la pasinta jaro la junulara klubo ĉe E-societo „Albatroso” — Varna, invitis je novjara renkontiĝo gejunulojn el la tuta lando. La dommasroj havis deziron organizi karnavalon, sed ĝi fakte ne okazis. Partoprenis nur du gastoj el Sofio. Malgraŭ tio meritas dankon la klopodoj de nia aktivulino el Varna Dimitrička Dimitrova.

Mi provis rakonti per konkretaj okazintaĵoj kaj eventoj pri nia junulara E-movado. Sed, kompreneble, antaŭstaras ankoraŭ multa farena laboro.

Atanas ILKOV,
vicprezidanto de BEJ



Okaze de la Internacia Virina Tago — Oka de Marto, la Redakcio proponas al vi, karaj legantoj, versaĵojn de kvar nuntempaj bulgaraj poetinoj.

LILJANA STEFANOVA

LASTAJ VORTOJ

*Mi ne plu amas vin, aŭskultu...
Momento maltrankvila.
Sufoko. Kaj silento.
Kaj en okuloj viaj mi
nek sufero, nek ofendo vidas.*

*Vi estas kvazaŭ muta.
Kvazaŭ ŝton'.
Mi scias, ke neelportebla estas la doloro.
Ne, ne riproĉu min! Jen sur la horizont' —
vi vidas — vintro jam rigoras.*

STANKA PENČEVA

LA MALFRUIĜINTA

*Nun
mi prikantus jam
ne la unuan amon —
la blankan, la senkorpan,
la printempan, la malvarman.
Nun mi prikantus
tiun ĉi, la senkompatan,
la senesperan,
la malfruiĝintan.
Ne, ĝi ne havas rezervitan lokon —*

VANJA PETKOVA

VI ĈIAM RESTU TIA

*Por ĉiam restu sub la sun'
vi tia, kia estas nun —
nobla, bona, aŭ netolerebla,
senzorga, maltrankvila, febla...*

*Ne provu vi eĉ por moment'
eniri aliulan rolon.
Kun vi mem vivu en konsent'
kaj ne ignoru vian volon.*

*La ĉefa rolo — rolo malfacila —
ja estas ludi vin mem sen dilem'*

*Ho, tiel pene elbuŝigis ĉiun vorton mi!...
Sed ĉio jam finiĝis.
Alia estas mia vojo —
vi komprenas.
Do, ni disiĝu sen paroloj kaj sen ĝemoj.*

*Tra neĝventegoj iros mi sen tim',
kaj senfortiĝos mi dum la penigaj jaroj,
sed al neniu
malsincere mi,
sen ami lin,
ekflustros:
„Kara!”*

*Ĝi devas ja detrui kaj surtreti,
ofendi, esti ofendata...
Ne paŝas ĝi sur genciano kaj filiko —
en koto marŝas ĝi,
sur akraj fajroŝtonoj,
ĝi marŝas —
ĉar la tempo sagrapidas,
ĉar venas jam disiĝo lasta...
Ĝi marŝas
tremigita de la nigraj flamoj
kaj ĝia spuro brilas sange...
Ne la unuan amon mi prikantas,
ho, ne la unuan.*

*kaj unufoje tre sincere preĝi ne al iu
por amo,
sed al la Amo mem.*

*Por ĉiam restu sub la sun'
vi tia, kia estas nun —
malsata, sata, malamata,
frivola, forĵetita, senkompata...*

*Terure estas kun duobla nom' —
simile al du flankoj de monero, —
se estas ĉiam malfermita via dom'
kaj ĉiu povus vidi tie ĉi, ke vi suferas.*

*Sed malgraŭ ĉio, nuda restu vi,
jes, nuda, kvankam tutan vivon
vin persekutos ia buba kri'.
Denove, kredu min, denove, efektive,
ekbrili povus frukt' sur unu branĉo.*

*Por ĉiam restu sub la sun'
vi tia, kia estas nun —
neakceptebla, aŭ malbela, aŭ neharmonia,
en tago freŝa kaj radia,
en tago griza aŭ ebria —
vi ĉiam restu tia!*

MIRJANA BAŠEVA

LUNDE

*Ni ĉiuj estas sklavoj
de unu posedanto —
la kalendaro...
Ni estas ĝia havo.
Ni ĉiuj sklave kredas,
ke — subite —
ekde lunde
ni komencos novan vivon
senkomparan.
Hura!
Mi ne plu fumos
ekde lunde.
Mi jam aranĝos bone
mian hejmon
kaj ĉi tiun kapon.
Do, mi viciĝos fine
en fruntaj marŝkolonoj
de ĉiuj, kiuj strebas
al tio*

*kaj alio.
Antaŭen!
Mi rezignas absolute
la neŭrasteniajn normojn
de konduto.
(T. e. mi intencas.)
Jam multajn jarojn
ĉiu tago
iom similas al mardo!
Sed ekde la venonta lundo
mi estos nova homo.
Mi nun edukas la kalendaron tre severe
en pacienco kaj respekto, kredo
al la lunda stelo.
Kaj tamen certa estas nur la tedo —
ke se dimanĉe
mi jam edziniĝos,
neniel miru,
se mi lunde
eksedziniĝos.*

Tradukis: Venelin MITEV

LAŬ OKULOJ DE INO

Virino diras, „mi estas kuiranto“ kaj viro diras, „mi estas manĝanto“ — sceno de reklama programero, kiu propagandis pri tujpreta nudelo en televido. Feministoj opiniis, ke la reklamo estas malutila, ĉar ĝi pravigas servadon de virinoj al viroj. Pro protestaj leteroj kaj telefonaj vokoj la reklamo baldaŭ malaperis. Tio okazis en 1975, la Internacia Jaro de Virinoj.

Similan problemon mi trovas ankaŭ en Esperantaj kursolibroj. „Nataŝa kuiras, kaj Johano legas ĵurnalon“ jen frazo el Lernokajero de Esperanto, uzata de EPA. „Vi havas saĝan knabon kaj ĉarman knabinon“ jen ekzemplo el Elementa Kurso de Esperanto. Ĉu vi diras, ke troviĝas nenio problema en la frazoj? Ne, ne estas problemoj en tio, ke viro legas ĵurnalon kaj virino kuiras; ne en tio, ke iu havas saĝan filon kaj ĉarman filinon. Estas problemoj, ke ĉiam virino servas dum viro distras sin; estas maljuste, ke saĝeco pli gravas ĉe knabo kaj ĉarmo pli gravas ĉe knabino.

La Teksto Unua, fama kaj vaste uzata kursolibro en Japanio, estas aranĝita laŭ okuloj de viro de la komenco ĝis la fino, al

mi ŝajnas. „Kaj ĉu vi havas edzinon?“ „Ne, ankoraŭ ne... dank' al Dio.“ jen nur unu el la ekzemploj, per kiuj la verkinto moka traktas virinojn. En la ekzercoj de la Teksto Unua oni trovas frazon: „Fraŭlino, ĉiam skribu al mi en Esperanto; feliĉe mia edzino ne estas esperantisto“. Supozeble la aŭtoro celis amuzi per spriteco, sed mi sentis min ofendita leginte la frazon.

Kursolibroj estas spegulo, kiu reflektas realan socion. En la Teksto Unua, eldonita en 1967, la ĉefroluloj estas juna laboristo kaj studento. En Elementa Kursolibro de Esperanto, eldonita en 1980, ĉefroluloj estas du geedzaj paroj, kaj unu el la edzinoj estas laboranta patrino. Kiel fidele la libroj reflektas la realan Esperantujon japanan!

Do mi ne akuzu la diskriminaciajn esprimojn en la lernolibroj; ataki figuron en spegulo ja estas sensenca ago. Tamen eĉ nura figuro helpas pripensi kaj iom ĝustigi la aferon, se ni atente observas ilin.

Aikawa SETUKO

(El „La Movado“ n-ro 450/88 — Japanio)



Jordan VÂLÇEV

REKVALIFIKIĜO

Eksonoras la vekhorloĝo
je la duono post la kvara,
saltleviĝas la edzino kiel
brogita, ektiras min je la pi-
ĵamo kaj la ordonoj ekplu-

vas — kion mi kuiru hodiaŭ kaj kiel ĝin kuiru. Poste ni ekkverelas, ĉar mi ĉiam pridemandas kiel la infanoj. La edzino ekfuriozas kaj jam estante ĉe la pordo ekkrias:

— Rezonemulo! Vi taŭgas por nenio!

Mi saltas — sendignigite kaj hororigite eksvingas la pugnojn kaj kuregas nudpiede al la pordo, sed ŝi jam estas forfluginta al laborejo. Mi revenas al la skribotablo kaj sur pura paperfolio haste skribas la recepton „fasta legomaĵo en bakforno“.

Mia tago komenciĝas. Mi poluras la ŝuojn de miaj filoj.

Polurante la ŝuojn, de tempo al tempo mi alkuras al la skribotablo por relegi la recepton. Mi konsideras eĉ la plej fajnajn peripetiojn de la kuirprocedo. Mi poluras la ŝuojn. En mia imago mi jam vidas tiujn nekapteblajn nuancojn de miaj movoj, kiuj rezultigos tempoŝparon kaj pruvos miajn kapablojn. Per iomete da raciigo mi liberiĝos de la intera ujo — la marmito — kaj ĝis la lasta momento antaŭ la meto en la finan ujon — la bakpelson, mi uzos nur la bazan ujon — la paton. Mia penso deflankiĝas, kiam mi ekvidas miajn notojn dissematajn sur la skribotablo. Mi forlasas ĉion, eksidas, kuspe faldas la manikojn kaj daŭrigas la komparon de la malnovbulgaraj verboj. Ĝuste kiam mi komencas gajiĝi, kiam en mia kapo traflugas plej novaj subitaj ideoj, mi konjektas, ke min atendas alia, pli grava laboro. La plenumo de la recepto komenciĝas!

Dum tiu ĉi tempo miaj filoj saltelitiĝas, malfermas la fenestron, batsenpolvigas la litkovri-
lojn kaj kovras la litojn — ja ili ekde plej juna aĝo devas havi tiujn utilajn kutimojn, kiuj
faros ilin imitindaj civitanoj. Dum la manĝaĵo ekbolas, mi kuras kun la balailo tra la ĉambroj.
Oh, mia nesuperita lerteco! Panjo kara, kial vi ne naskis min knabino? Mi konjektas, ke mi
estas en piĵamo, sed mi nun haste kuras por lavi kaj vesti min, ligas la italan nodon kaj —
hop! — ĉiu ĉe la tablo por matenmanĝo.

La infanoj ekiras al siaj laborlokoj — legas, skribas, eltondas. Mi finbalaas, ripozas por
la unua fojo, ekbruliginte cigaredon kaj provas per fingro la akvon en la kaldroneto. Komen-
ciĝas la ĉiutaga lavado kun antaŭtuko kaj amelita kolumo. Je la 11-a horo la lavita tolaĵo
jam estas sternita. La libroj kaj la vortaroj denove min vokas.

Kiam la legomaĵo estiĝis preta, kiam la infanoj tagmanĝis, kiam ili ŝtelforiris al la lernejo —
tion mi ne memoras. Mi jam havis kapturniĝon kaj sidis sur la planko, kiam mia edzino
denove ektiris min.

— Vi nur fumas, ĉu ne! Vi mortigos min, sentaŭgulo!

Mi ripetas senvoĉe la frazon de Niĉeo pri la virino kaj la knuto, sed voĉe mi nenion diras,
silentas, paciencas kaj nur kuntiras la ŝultrojn. Mi komencas prepari la manĝotablon. Mia
edzino manĝas furioze, mi penas amuzi ŝin.

— Ĉu la manĝaĵo bongustas? — demandas mi.



Foto: Samuil MILEV

- Jes, bongustas, ŝi ekgrumblas, — bongustas, sed io incitas la nazon kaj la gorgon.
- Kiel ĝi incitas — mi saltetas — mi faris ĉion laŭ la recepto!
- Eble mi estas laca — diris ŝi rezignacie. — Sidiĝu kaj ankaŭ vi manĝu!
- Mi obeas, tuj!!
- Ne! — Ŝi haltigas min. Unue lavu mian laborrobon. Verŝu en la akvon ankaŭ kerosenon, por forigi la makulojn de maŝinoleo. Mi lasis kerosenon en iu glaso, trovu ĝin!

Mi frotas la laborrobon per sapo, sed ne povas trovi la malbenitan kerosenon, sed ĉu oni kuraĝas demandi!

— Do enverŝu la kerosenon! — ŝi ekgrumblas.
Mi mallertas, murmuretas.

— Jes, vere kien mi metis ĝin? — ŝi demandas sin, kuntiras la brovojn, miras kaj subite ekkrias:

— Jes, mi enverŝis ĝin en akvan glason kaj lasis la glason sur la submetaĵon apud la akvokrano. Sed jen — ĝi ne estas tie!

Mi ekrigardas al la submetaĵo apud la akvokrano, ekkonjektis pri miaj ŝparemaj movoj dum la kuirado kaj mi plaŭdbatis la frunton. Mia edzino ankaŭ plaŭdbatis sian frunton. Samtempe ni ekiris al la legomaĵo, samtempe ni klinis nin por ekflari ĝin.

Mi denove malkuraĝe parolas:

— Sed vi ja diris: mi verŝu rapide akvon en la fritsaŭcon kaj mi... enverŝis.

— La kerosenon! — ekkriis mia edzino.

— Sed... ĉu estas permesite meti glason kun keroseno apud la akvokrano?

Kaj ŝi sole tion atendas, ekfuriozas, muĝas kiel drako, kaj tio ĉi ne havas finon!

Tiel pasadas la tagoj. Aŭdante la kortpordon ekgrinci, mi forgesas la historion kaj la filozofion, kaŝas la cindrujon kaj ĵetas min peli tra la fenestro la tabakfumon.

Mia timemo ne restis nerimarkita fare de miaj najbarinoj kaj ili, observante kiel mallerte mi sternas la lavitan tolaĵon, siavice komencis instrukcii min, tamen ili almenaŭ faris tion sen ironio, sen malamo, sed kiel oni instrukcias novedzinon — koncize, kun simpatio. Mi dankadis al miaj najbarinoj kaj, laŭ malnova kutimo, mi kliniĝadis galante. Miaj kliniĝoj ŝajnis iomete ridigaj, ĉar en miaj manoj flirtadis rozaj aŭ banankoloraj virinkalsonoj, kaj sur la kolo balanciĝadis la koliero kun la tukpinĉiloj.

Kiel ĉiam ĉe konatiĝo kun novedzino la najbarinoj komencis montri scivolemon pri mia sorto. Mi diris, ke mi ege amas mian edzinon. Ili balancadis skeptike la kapojn. Sed ili aprezadis mian konsekvencon diskretecon. Tial ili komencis konduti al mi kiel al plej fidela amikino. Ni interparolas pri la hejma laboro — ĉu ni finlavis, ĉu ni finpurigis la fenestrojn. Mi fariĝis vera ina Pejo¹⁾ kaj miaj rilatoj kun la najbarinoj progresis tre idilie: se iu el ili ekiras ien, ŝi ekkrias tra la barilo, ĵetas al mi la ŝlosilon kaj komisiis al mi prizorgi ŝiajn fornon kaj infanojn: alia konsultis min pri la fritsaŭco kaj mi ĉiam atentigis ŝin ne meti kerosenon proksime de la akvokrano. La virinoj komencis konsideri min kiel Ljuckan el la rakonto de Jordan Jovkov²⁾. Ili eĉ levis antaŭ mi siajn robojn por tiri supren siajn kalsonŝtrumpojn. Ĉio ĉi akceptiĝis kiel normalaĵo kaj impresis neniun. De tempo al tempo tamen min obsedis furiozo kaj mi komencis kriegi kontraŭ la profesoro, kiu ne venis por la difinita renkontiĝo. La virinoj interrigardis unuj la aliajn kaj iliaj okuloj humidiĝis. Ili ne komprenis kia estas la esenco de la disputo pri la mezepoka bulgara arto, sed ili diradis al si: „Kompatindulo! Lia sano ne estas en ordo!“ Kaj ili fariĝis pli afablaj al mi. Se iu el ili ekiros por aĉetoj, unue min sciigos pri tio. Ni iris kune — kiel amikinoj.

La idilio daŭris plu, mi ne plu estis novedzino, mi jam akiris sperton, ili jam komencis invitadi min al vizitoj ĉe akuŝintinoj kaj al infanfestoj. Ĉio ĉi ege plaĉis al mi, mi komencis plendeti kontraŭ mia edzino — ke ŝi malkontentas pro tio, ke mi odoras je tabako kaj fritsaŭcoj, ke ŝi ne elhejmigas min meze de la homoj. La virinoj indignadis kaj kiam ili eliris kun siaj edzoj al promenado, invitis ankaŭ min, same kiel oni invitas vidvinojn aŭ forlasitajn edzinojn kaj maljunajn fraŭlinojn. La viroj fine kondukis nin en la drinkejon, mendis por si mem brandon kun aldrinka manĝaĵo kaj por siaj edzinoj kaj por mi mendis limonadon.

Kion fari, mi trinkis la limonadon, ja ne eblis apartiĝi de la kolektivo.

¹⁾ Ina Pejo — virinkonduta viro

²⁾ Jordan Jovkov (1880—1937) — elstara bulgara verkisto, klasikulo de la bulgara literaturo.

ADRESARO

(Daŭrigo de n-ro 2/1989)

DEPARTEMENTO DE PLOVDIV

4000 Plovdiv
P. K. 151
Veselina Kurteva
E-societo „Kulturo“

4026 Plovdiv
str. „Landos“ 24—2b
Vladimir Ĵelev
E-societo „Lumo“

4230 Asenovgrad
P. K. 10
Emil Ĉirpanski
E-societo „David Sasonov“

4300 Karlovo
P. K. 44
E-societo „Vasil Levski“

4700 Smoljan
P. K. 42
Rumen Bukov
E-societo „Kulturo“

4850 Ĉepelare
str. „9-ti septemvri“ 11
E-societo „Diĉo Petrov“

4270 Pârvomaj
P. K. 61
Pavlina Kamburova
E-societo „D-ro L. L. Zamenhof“

4225 Peruŝtica
str. „Petâr Bonev“ 6
Stojan Zlaĉev
E-societo „Apostol Zlaĉev“

4220 Stambolijski
str. „8-mi mart“ 1
P. K. 203
Stojan Gaberov
E-societo „D-ro L. L. Zamenhof“

4199 v. Trud
Aleksandâr Plaĉkov
E-societo „Paco“

4800 Devin SP BKS
Milko Topalov
E-societo „Orfeo“

4900 Nedelino
str. „S. Rumjancev“ — 1A
Vasil Petrov
E-societo „Revo“

4960 Rudozem
P. K. 11, Esperanto
E-societo „Amikeco“

4921 Vârbina
Jasen Karamitev
E-societo „Juneco“

4400 Pazarĝik
str. „Gurko“ 3—A
Petko Arnaudov
E-societo „Radio“

4470 Belovo
kv. „VI. Zaĥariev“
str. „Spartak“ 2
Stefka Angelova
E-societo „G. Dimitrov“

4900 Madan
str. „Rodopi“ 1
Bl.1, Vh.V, ap.2
Milko Kiĉukov
E-societo

4465 Cerovo
Nikola Zaĥariev
E-societo „Progreso“

4500 Panagjuriŝte
str. „Benkovski“ 1
Nikola Lambov
E-societo „Nova Stelo“

4840 Ŝiroka Lâka
Atanas Atanasov
E-societo „Lumo“

4980 Zlatograd
str. „K. Filipov“ 47
Blaga Despotova
E-societo „Rodopa Sonoro“

4860 Batak
str. „Orfej“ 23
Veneta Gazinĉeva
E-societo „P. Toŝkov“

4579 Bracigovo
str. „Prolet“ 2
Irina Todorieva
E-societo „N. Miŝev-Kamarad“

4485 Bratanica
Vaska Gavrilova
E-societo „G. Dimitrov“

4468 Momina Klisura
str. „Vtora“ 9
Jordan Nikolov
E-societo „Leono“

4550 Peŝtera
str. „Kosta Gjoŝev“ 7
Penka Foleva
E-societo „Nova Epoko“

4640 Rakitovo
str. „Parka“ 20
Aksinija Topalova
E-societo „Ĉepina“

4600 Velingrad
P. K. 7
Boris Gaĝanov
E-societo „Stoju Kalpazanov“

4490 Septemvri
str. „V. Levski“ 69
Dimitâr Titerlekov
E-societo „Aŭroro“

4831 Dospat
V. Pljavov
E-societo „Diĉo Petrov“

(Daŭrigo en n-ro 4/89)

Abonu revuon „Scienca Mondo“

Organo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj, revuo „Scienca Mondo“ estas luksa 32-paĝa periodaĵo, aperanta 4-foje en la jaro.

Sur la paĝoj de revuo „Scienca Mondo“ oni povas legi scienc-popularajn artikolojn pri paca kunlaborado inter la popoloj, pri ekologiaj problemoj, scienc-teknika revolucio ka. La aŭ-

toroj estas laŭreatoj de Nobel-premio, akademianoj, profesoroj, mondkonataj scienculoj.

Jarabono: por individuaj abonantoj — 2,56 lv; por organizaĵoj, institutoj, entreprenoj ktp — 3,20 lv. Kun abonpetoj bonvolu turni vin al la Redakcio: „Scienca Mondo“, str. Obo-riŝte 35, 1504 Sofio, Bulgario.



Denove pri la planlingva problemo

Lastatempe la amaskomunikiloj anoncis la naskiĝon de pluraj novaj projektoj de universala lingvo. Specialan atenton meritas du el ili: Jazu de Cedendambin Bold (Mongolio) kaj Eljundi de Aleksandr Kolegov (Sovetio). Ambaŭ aŭtoroj per ĉiuj fortoj penas allogi publikon kaj adeptojn, pro tio Jazu kaj Eljundi povus esti tre signifaj por la mondlingva movado.

Pri Jazu oni sciigas, ke ĝin kreis C. Bold, konata mongola sciencisto kaj tradukisto, kiu scipovas Esperanton kaj konscias pri ĝiaj avantaĝoj, sed li opinias, ke Esperanto ne respegulas la specifaĵojn kaj la riĉecon de la aziaj kaj afrikaj lingvoj. Jazu estas kreita surbaze de azilingva leksiko kaj de la latina alfabeto; ĝi havas simplan gramatikon, similan al la gramatiko de Esperanto. La projekto estis prezentita dum la lasta kongreso de mongolologoj kaj aprobita de ĝi. Estas kreita centro por disvastigado de Jazu. Nun la aŭtoro pretigas lernolibron, vortaron kaj konversacilibron.

Se oni atente ekzamenus la aperintajn informojn pri Jazu, oni nepre konstatus, ke en ili estas multaj atakendaj punktoj. Eĉ se oni preterlasus iujn detalaĵojn, oni tamen devus starigi jenajn demandojn: Kion do la kreinto de Jazu prezentis al la atento de la kongresanoj kaj kion oni aprobis, se nek lernolibro, nek vortaro, nek koversacilibro estas pretaj? Kiamaniere li sukcesis konvinki la kongreson pri la taŭgeco de la projekto: eble li nur priskribis sian koncepton pri la strukturo de Jazu? Se oni ankoraŭ ne pruvis en la praktiko, ke la lingvoprojekto estas efektive realigebla, ĉu ne estas tro frue krei centron por disvastigi ĝin?

Mi plene konsentas, ke Esperanto ne respegulas la specifaĵojn de la aziaj kaj afrikaj lingvoj. Sed ĉu oni nepre devas esti lingvisto por kompreni, ke estas sence posteuli de universala lingvo, ke ĝi respegulu la specifecon de iu ajn aŭ eĉ samtempe de ĉiuj etnaj lingvoj? Tio estas nek necesa,

nek ebla. Gravus nur, ke ĝi povu esprimi la tutan gamon de nuancoj de la homa penso — kaj tiurilate la miloj da aziaj esperantistoj ne plendas. Ili parolas, korespondas, verkas kaj elsendas radioprogramojn en Esperanto, kaj, evidente, ĝi bone kaj adekvate esprimas iliajn sentojn kaj pensojn, kvankam ĝi disponigas al ili aliajn lingvajn rimedojn.

Ankaŭ la projekton Eljundi oni povus longe analizi kaj kritiki, sed eble sufiĉas nur scii, ke temas pri apriora sistemo — ĝia leksiko estas elpensita de la aŭtoro mem. La ĝisnuna praktiko klare montris, ke ĉiuj similaj projektoj rapide fiaskis.

C. Bold kaj A. Kolegov havas la ambicion solvi la problemon pri internacia helplingvo. Sed estas malserioze pensi, ke oni facile povus konkuri kun Esperanto, kiu dum sia centjara ekzistado jam gajnis konsiderindan respekton kaj gravajn poziciojn en la internacia vivo.

Erarige kaj laŭ mi eĉ iom malhoneste estas, ke ĉiuj propagandantoj de novaj planlingvaj projektoj prisilentas la veran evoluon kaj la nunan staton de la ideo pri universala lingvo. Ili mencias Esperanton kvaŭzaŭ pasintan etapon, emfazas ĝiajn — ofte nur ŝajnajn! — malperfektaĵojn kaj prezentas la laŭvican novan projekton kiel definitivan solvon de la problemo.

Mi opinias, ke simila maniero de propagando estas danĝera ne tiom por Esperanto, kiom por la mondlingva ideo ĝenerale. Fojfoje la informoj aperantaj en la gazetaro estas tiel evidente nekompetentaj — ne nur el lingvistika vidpunkto! — ke ili povus entute kompromiti la ideon pri internacia helplingvo, ĉar la ekzisto de pluraj „universalaj lingvoj“ kun malmultnombra adeptaro fakte signifas, ke ekzistas neniu vere universala lingvo. Ĝuste pro tio ni rajtas kaj eĉ devas tuj reagi al similaj sciigoj.

Mariana EVLOGIEVA





ĜOJIGA EŬO

Per la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ mi volus denove kapti la atenton de ĝiaj fidelaj legantoj kaj samtempe esprimi mian kontentecon kaj ĝojon pro la eŭo al mia artikolo aperinta en n-ro 7—8/1988.

Pro la fakto, ke la redakcio publikigis mian hejman adreson, mi ricevis multajn leterojn de tute nekonataj por mi personoj. Iuj estas el Bulgario, aliaj — senditaj de eksterlandaj esperantistoj.

Esperantistino el Rigo (Latva SSR) skribas, ke mia artikolo esprimas ankaŭ ŝiajn proprajn opiniojn pri amika korespondado. Dank' al ĝi, en ŝia vivo mankas la enuo. Ŝi ĉiam trovas tempon por skribi al siaj geamikoj.

Plenan koverton de bildkartoj pri urbo Ĉernovci sendis al mi ukraina samideano. Abonanto de „Bulgara Esperantisto“ de multaj jaroj, li, traleginte mian artikolon, nomis ĝin „inspiroplena kaj solena himno al nia kara lingvo Esperanto“. Eble iomete forte sonas tiu ĉi esprimo, ĉu ne? Tamen mi estas kortuŝita, ke li komprenas min tre bone, ke ni ambaŭ admiras samajn idealojn! Kiel kolektanto kaj lingvisto li subtenis en la pasintaj jaroj vastan korespondadon. Daŭre li kolektas poŝtmarkojn, havas propran bibliotekon.

Ege interesa letero venis el Hispanio. Tute nova hispana esperantistino petas pardonon, ke ŝi ankoraŭ ne bone posedas la Internacian Lingvon. Ŝia letero vere ĝojigis min! Dank' al siaj jam 30 leteramikoj ŝi estas „virino tre, tre feliĉa“! Ŝi jam partoprenis du universalajn kongresojn kaj surprizigis min per bela bildkarto el sia vojaĝo kaj restado en Nederlando!

Valoraj por mi estas la leteroj de bulgaraj esperantistoj. Samideano el Plovdiv bedaŭras, ke lia korespondado ne funkcias bone dum la lastaj jaroj, sed li intencas revigligi ĝin. Li petas, ke mi helpu al li krei leterkontakton kun iuj el miaj korespondantoj el diversaj landoj, sendepende de

ilia aĝo. En sia afabla letero li proponas al mi konatiĝon ĉe mia eventuala vizito en Plovdiv. Li plendas, ke renovigo de korespondado praktike ne estas facila afero. Ĝuste pri tiu punkto mi permesas al mi ne konsenti kun lia opinio. Tamen, mi volonte helpas al li!

Maljuna esperantistino el Varna skribis sur la koverto de sia letero: „Esperanto — magia lingvo“. Ŝi ankaŭ havas grandan nombron da leteramikoj el la tuta mondo. Tiel sincere ŝi priskribas sian vivon, la staton de sia familio!... Dank' al Esperanto ŝi havis gastojn el Sovet-Unio kaj tiu vizito donis al ŝi grandan ĝojon.

Emociis min ŝiaj vortoj, ke mia artikolo varmigis ŝian animon!... Jen, mi diris al mi: bona rezulto, ĉu ne?!... Ŝi nomis sin: „babuŝka Ivanuŝka“ kaj ankaŭ proponis al mi gasti ĉe ŝi.

Venis seriozaj proponoj pri kunlaboro, organizo de komunaj ekspozicioj, interŝanĝo de Esperanto-materialoj, libroj, gazetoj, poŝt-kaj bildkartoj, Esperanto-leteroj k. a. Gvidantoj de Esperanto-kursoj, societoj kaj grupoj petas min sendi al ili esperantaĵojn.

Do, tia estis la eŭo post la apero de mia modesta artikolo. Eble venos ankaŭ novaj leteroj! Mi nepre respondos al ĉiuj. Eble ni fariĝos bonaj amikoj, karaj Maria-Luisa el Hispanio, Aleksej el Ĉernovci (Ukrainio), Nielande el Rigo!...

Karaj bulgaraj geamikoj Ivanka, Dukov, Aleksiev k. a.! Atendu mian respondon! Ĝi baldaŭ venos al vi. Dankon pro viaj invitoj, proponoj! Mi ne perdas la esperon, ke ili realiĝos!

Karaj gesamideanoj el vilaĝo Krân! Ankaŭ mi strebos de tempo al tempo ĝojigi vin per sendado de esperantaĵoj.


Karaj gesamideanoj el la tuta mondo! Per korespondado — kuraĝe laŭ la vojo de amikeco!

Liliĵa KOLEVA



Gravega libro en Esperanto

La 19-a Tutsovetia Konferenco de KPSU. Dokumentoj kaj materialoj. Raporto, elpaŝo kaj parolo de Ĝenerala Sekretario de CK de KPSU Miĥail Gorbaĉov. Rezolucioj. Eldonejo APN, Moskvo, 1988, 143 paĝoj. Formato: 19 x 12,5 cm.



La tuta mondo kun grandega intereso sekvis la laboron de la XIX Tutunia Konferenco de KPSU. Ĉiuj bone konsciis, ke tiu konferenco estas natura daŭrigo de la laboro iniciatita far la XXVII Kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio. La pasinta post la konferenco periodo pruvis, ke ĉiuj gravegaj ŝanĝoj en la politika sistemo de Sovetunio prezentas per si mem realigon de la konferencaj decidoj. Oni povis ankoraŭfoje konvinkiĝi, ke inter decidoj kaj faroj mankas kontraŭeco.

La decidoj mem estis bone pripensitaj, diskutitaj tiel dum la preparperiodo de la konferenco, kiel ankaŭ dum la debutoj en la konfe-

renckunsidoj. Ĉiuj opinioj aperis en la gazetaro kaj fakte la tuta mondo havis eblecon konatiĝi kun ili. La soveta televido permesis al la publiko en USSR kaj en eksterlando sekvi la laboron de la konferenco, konatiĝi kun la proponoj, kritiko kaj konsiloj de la konferencanoj. Eĉ io plia: la televidaj spektantoj havis eblecon observi la fizionomiojn kaj la gestojn de la diskutantoj, aŭdi ties voĉojn, travivi kun ili iliajn sentojn, gestojn kaj humoron. Estis klare videble kiel en la salono konferencanoj reagis al la debutantoj — ĉu per konsento kaj aplaŭdoj, ĉu per replikoj aŭ per akra malkonsento. Aŭtentika parlamenta atmosfero de publikeco!


Kaj jen, la monda esperantistaro, kiu same interesiĝas pri la okazintaĵoj en la plej granda socialisma ŝtato, kiu (la esperantistaro!) aprobas la renovigon de la soveta socio kaj la publikecon, nun povos legi la materialojn de la konferenco (sen la debutantoj), la raporton de Miĥail Gorbaĉov kaj lian ferman paroladon antaŭ la XIX partia konferenco. Same oni povas studi la rezoluciojn de la konferenco, kiuj prezentas la bazon de la iniciatitaj ege gravaj ŝanĝoj en la politika sistemo de USSR.

La esperantistaro tutmonda kun intereso atendas vidi kiamaniere la renovigo en USSR reflektos en la agadon kaj la organizan strukturon de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE), kies konferenco verŝajne okazos en la komencaj monatoj de la kuranta jaro.

Nikola ALEKSIEV

Literatura revuo en E-versio

MERIDIANS 12-23



Miajn manojn trafis n-ro 11 de interesige titolita revuo „Meridians 12—23“ („Meridianoj 12—23“¹⁾). Ĝi estas revuo pri slovakaj literaturo, eldonata de la Unuiĝo de Slovakaj Verkistoj, aperanta unu fojon jare en la lingvoj angla, franca, germana, hispana kaj rusa. La unua numero aperis en 1976.

Numero 11 (por la jaro 1987) estas luksa 240-paĝa libro de formato 23 x 16,5 cm, plus 56-paĝa kolora suplemento. En ĝi krom la angla-lingva parto, kiu enhavas la ĉapitrojn „Sociaj sciencoj“, „Literatura scienco“, „Poezio“, „Prozo“, „Nefikcia kaj sciencfikcia literaturo“, „Literaturo por infanoj kaj junuloj“, „Dramo“, „Arto“, „Slovaka literaturo eksterlande“, estas 15-paĝa Esperanta parto titolita „Slovaka literaturo, tradukita en Esperanton“.

La Esperanta parto komenciĝas per mallonga alparolo al la legantoj. En ĝi interalie estas dirite: „Ni komencas eldonadi la revuon „Meridianoj“ ankaŭ en Esperanto, emante

prezenti al vi la nuntempa slovak literaturon kaj kulturon ĝenerale. Por fari tion, ni elektas la plej efikan vojon alproksimigi niajn naciajn literaturajn valorojn al la mondo pere de la Internacia Lingvo, kiu kapablas perfekte esprimi ĉiujn nuancojn de la pensado kaj parolmaniero." En la alparolo estas notite, ke „precedento por nia paŝo estas la fakto, ke „Slovaka Antologio“, kiu aperis en Esperanto jam en 2 eldonoj, renkontis favoran eĥon en la tutmonda publiko²⁾. La alparolo finiĝas per kredo, „ke la eldono de „Meridianoj“ en Esperanto alproksimigos al la mondo la slovak literaturon kredon kaj kulturan aktivadon“.

La Esperantan parton eniras jenaj materialoj: „Interparolo kun nacia artisto Rudo Moric 27.III.1921—26.XI.1985“, „Ni ne estas nacioj sen historio“ (el la pensoj de Julius Hanus, unua vicprezidanto de la registaro de Slovaka Socialisma Respubliko, kaj fragmentoj el la romano „Ĝardeno (en la kvina jarsezono) de Jozef Puškaš, el la rakonto „Lumo super Meza Pinto“ de Belo Kapolka kaj el la komedio „Petro kaj Paŭlo“ de Jan Solovic kune kun literaturaj portretoj de la aŭtoroj kaj recenzo de Jana Vranova pri la libro „Romia kaj ĝermana artoj en Slovakio“ de

Titus Kolnik. Ĉiuj ĉi materialoj estas entenataj en la anglalingva parto de la revuo. La eldono de la revuo en Esperanto-versio vere kontribuas por alproksimigo de la slovak literatura kreado al la mondo. Krom la literaturaj materialoj ege plaĉaj estas la grafikajoj de Martin Činovský kaj la stiligitaj skulptaĵoj de Ludwik Korkoš.

La tradukoj estas faritaj de unuj el la plej spertaj tradukistoj en Slovakio E. Tvarožek (Tvaroĝek) kaj Magda Šaturova. Ili estas faritaj en bonstila Esperanto.

La prezento en Esperanto de parto de la numero, kvankam malgranda, estas signifa sukceso por Esperanto dum ĝia jubilea jaro, kaj por la slovakaj esperantistoj. Tio, laŭ mia scio, estas precedento en la historio de Esperanto, gratulinda kaj sekvinnda. Ĝi atestas pri favora rilato de la Unuiĝo de Slovakaj Verkistoj al Esperanto, pri rekono de ĝiaj eblecoj

„kaj“ pozitiva rolo sur la literatura tereno.

Ne estas klare ĉu estonte la revuo aperados entute en Esperanta versio, aŭ denove nur parto de ĝi. Eble tio dependos de la eĥo de la eksterlandaj legantoj, kiuj ricevis ekzempleron de numero 11/87 de la revuo aŭ havis eblecon legi ĝin. La eĥo devas esti adresita al la Unuiĝo de Slovakaj Verkistoj (Zväz slovenských spisovateľov, Obrancov mieru 14, 81508 Bratislava, Ĉeĥoslovakio).

Mi rekomendas al la redakcio de la revuo, ke la rakontoj laŭeble estu aperigataj sen mallongigoj, kio ebligus ilian eventualan tradukon en naciajn lingvojn. Tiamaniere Esperanto servos kiel pontolingvo.

Mi deziras sukceson al la Esperanto-versio de revuo „Meridianoj 12—23“.

Dimităr IVANOV

¹⁾ *Temas pri la meridianoj, inter kiuj situas Ĉeĥoslovakio.*

²⁾ *„Bulgara Esperantisto“ ankaŭ reagis favore al „Slovaka Antologio“ per la ampleksa recenzo de D. Haĝiev, titolita „Alloga bukedo“ (vidu n-ro 12/1978).*

Nova libro pri Trifon Ĥristovski



Karaj legantoj,

Dank' al la aŭtobiografia libro „Mia Vivo“ (aperinta bulgarlingve en 1950 kaj en Esperanto — en 1974) ni ĉiuj scias kiu estas Trifon Ĥristovski — eminenta bulgara esperantisto-kontraŭfaŝisto, verkisto kaj flama publicisto. Sed eble malmultaj scias, ke lia riĉa arkivo el leteroj kaj publicistaj verkoj dum pluraj jaroj restis neprilaborita. Post konatiĝo kun tiu arkivo oni povas konstati, ke temas pri unu el la plej talentaj reprezentantoj de nia revolucia publicistiko. Kaj certe ne estas alia bulgara esperantisto, kiu dum pluraj jaroj, en la kondiĉoj de kruela faŝisma teroro tiel celdirekte utiligis la Internacian Lingvon Esperanto por stabiligo de l' solidareco de la batalanta proletaro el pluraj landoj.

Ege bedaŭrinde estas, ke tiu talenta revolucia publicisto ĝis nun ne estas prezentita al la vasta publiko.

Tiu manko baldaŭ estos plenigita de la frato de Trifon Ĥristovski — Dimităr Ĥristovski. Prilaborinte lian arkivon, li preparas por publikigo kolekton, kiu enhavos leterojn, publicistajn verkojn, rememorojn, literaturajn portretojn, fragmentojn el nepublikigitaj verkoj de Trifon Ĥristovski.

La laboro de Dimităr Ĥristovski jam iras al sia fino. Por ke la eldonota kolekto povu pretendi pri maksimuma kompleteco, li turnas sin al apartaj esperantistoj, al bibliotekoj kaj muzeaj kolektoj posedantaj leterojn de Trifon Ĥristovski aŭ aliajn materialojn ligitajn kun lia vivo, Ekorespondado kaj publicista laboro kun peto disponigi al li la koncernajn materialojn. Bonvolu skribi al la aŭtoro laŭ adresc: Dimităr Ĥristovski, Sofio 1303, kv. Aprilski, bl. II, vĥ. G, ap. 213, Bulgario.

VI Internacia Konferenco de KEK en Ruse

En la jaro 1989, de 24-a ĝis 27-a de aŭgusto en urbo Ruse, okazos la VI Regula Internacia Konferenco de Esperantistoj Komunistoj. Tiun decidon oni prenis dum la V Regula Konferenco okazinta en la aŭstria urbo Vordernberg en septembro 1988.

Kvankam la ekzistado kaj la agado de Komunista Esperantista Kolektivo (KEK) estas vaste konata, ĉe ni venas el diversaj landoj multe da leteroj, en kiuj oni demandas nin kaj volas scii iom pli multe pri la historio kaj la agado de KEK.

Do, ni decidis, ke estas tre necese informi, kvankam koncize, ĉiujn petantojn kaj ankaŭ iujn, eĉ malnovajn esperantistojn, kiuj tamen ne konas la historion de la laborista esperantista movado.

En la jaro 1921 en Prago estis fondita Sennacieca Asocio Tutmonda — SAT, kies celo estis organizi ĉiujn progresemajn kaj liberpensantajn homojn por batali kontraŭ la monda reakciularo. La oficiala organo de SAT estis „Sennaciulo“. En SAT partoprenis precipe maldekstruloj: komunistoj, socialistoj, socialdemokratoj, anarkistoj kaj ĉiuj liberpensantaj homoj. Samtempe en 1921 fondiĝis la komunista esperantista organizo en Bulgario. Ĝi ekzistis ĝis 1924, kiam en la lando estis establita faŝista reĝimo kaj malpermesita la Esperanto-movado.

Dum la jaroj 1921—1930 SAT sukcese plenumadis siajn planojn. Ĉiujare kaj regule okazis ĝiaj kongresoj. En SAT membris pli ol 4 000 geesperantistoj el Sovetunio kaj ĝia aŭtoritato estis granda. Dank' al tio, dum 1926 la Soveta Registaro organizis kaj efektivigis la VI Universalan Kongreson de SAT en Leningrado. Unuafoje en la mondo aperis poŝtmarkoj dediĉitaj al Esperanto, eldonitaj de la soveta poŝtoŭficejo.

Post 1928 la estraro de SAT falis en la manojn de la anarkistoj, kiuj rezignis la proletajn principojn kaj distanciĝis de la komunismo kaj marksismo-leninismo. La socialdemokratoj, anarkistoj kaj pseŭdokomunistoj komencis malkaŝan antisovetan batalon kaj dum la hispana intercivitana milito preskaŭ perfidis la klasan batalon.

Dum 1930 la komunistoj-esperantistoj forlasis SAT kaj establis la „Internacion de Proletaj Esperantistoj“ (IPE). Pli ol 4 000 sovetaj esperantistoj aliĝis al IPE. Grandparte ankaŭ la komunistoj el Germanio, Francio, Anglio, Svedio kaj aliaj landoj aliĝis al IPE. Tuj post sia fondiĝo IPE komencis eldoni sian organon „Internaciisto“. La sidejo de IPE estis en Berlino.

La bulgaraj komunistoj tute solidare al IPE kreis Laboristan Esperantistan Asocion, LEA

kies organo estis „Balkana Stelo“. Dum 1934 en Bulgario okazis dua puĉo fare de la militestroj, kiuj malpermesis ĉiujn partiajn kaj progresemajn organizojn, inter kiuj ankaŭ LEA.

Samtempe en Germanio, Hitler prenis la regpotencon kaj per severa leĝo malpermesis la ekzistadon de IPE. La presejo kaj la havaĵo de IPE estis disbatita kaj forrabita de la faŝistoj kaj granda parto de la membroj estis arestitaj kaj ĵetitaj en koncentrejojn kaj malliberejojn.

Dum la antaŭ- kaj postmilitaj jaroj la movado stagnis. Post longa stagnado, en 1974, laŭ iniciato de la aŭstria komunisto, partoprenanto en la hispana intercivitana milito Franc Hajderer kaj aliaj komunistoj el Hispanio, Francio, FRG kaj aliaj landoj, renaskiĝis la agado de IPE sub la nomo Komunista Esperantista Kolektivo (KEK) kaj daŭre estas eldonata la organo de IPE „Internaciisto“.

Dum la Budapeŝta Universala Kongreso (1983) estis organizita la unua postmilita oficiala konferenco fare de kamaradoj Franc Ŝik kaj Franc Hajderer, ambaŭ el Aŭstrio. Estis aranĝita riĉa ekspozicio. La konferencon partoprenis dekoj da komunistoj — veteranoj de la hispana intercivitana milito el Bulgario, Hispanio, Portugalio, Francio, Aŭstrio, GDR, FRG, Svislando, Belgio, Anglio, Hungario kaj aliaj landoj.

En 1985 en Aŭgsburgo (FRG) okazis la Dua Regula Konferenco de KEK. Ankaŭ tiun Konferencon vizitis bulgaraj reprezentantoj. En 1986 la Trian Regulara Konferenco oni organizis en la aŭstria urbo Vordernberg.

Dum 1987 en la programo de la Universal Kongreso okazinta en Varsovio estis antaŭvidita la Kvara Regula Konferenco de KEK. La konferencon partoprenis pli ol 180 gekamaradoj el la tuta mondo. La intereso al KEK kaj ĝia aŭtoritato kreskis multoble.

La lasta Kvina Regula Konferenco okazis denove en urbo Vordernberg — Aŭstrio. Tiu konferenco estis la plej grava laŭ la antaŭvidita tagordo kaj la pridiskutitaj demandoj kaj decidoj.

Ljuben GROZDANOV

ZAMENHOFAJ TAGOJ

SOFIO. La 14-an de decembro 1988 la Centra Kulturdomo ĉe BEA organizis solenan vesperon dediĉitan al la 129-a datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof, kiu okazis en la Domo de Bulgara-Soveta Amikeco. Ĉeestis estraranoj de BEA, veteranoj de la bulgara E-movado, lernantoj, membroj de la Junulara Sekcio ĉe BEA.

La solenaĵon malfermis Nevjana Krâsteva. Sekvis riĉa literatur-muzika programo. A. Sotirova plenumis versaĵojn de Kalocsay kaj Zamenhof. La ĉeestantoj ĝuis la kantojn de Puccini kaj Bellini, plenumitajn de la kantistoj K. Adamova kaj T. Atanasov. Lernanta grupo el 4-a lernejo en Sofio prezentis literaturan-muzikan muntaĵon, lernantoj el 108-a lernejo plenumis modernajn dancojn. La etoson variigis internaciaj humuraĵoj plenumitaj de du aktorinoj de BET.

Post la riĉa literatura-muzika programo K. Vâlev inspire parolis pri Zamenhof kaj pri lia kreaĵo — la lingvo Esperanto. Li substrekis, ke nur Esperanto sukcese vivas jam 100 jarojn — la aliaj projektoj de internacia lingvo estis nevivipovaj. „Zamenhof estis modesta homo, li mem nomis sin ne kreinto, sed iniciatinto de Esperanto. Li donis nur la fundamenton kaj postlasis al la homaro la taskon evoluigi la lingvon“, diris K. Vâlev. „Ni dankas al Zamenhof, kaj ni devas esti dignaj posteuloj, daŭrigantoj de liaj ideoj“.



Grafikaĵo: Vladimir LAZAROV — Pavlikeni.

Post la oficiala parto sekvis vespermanĝo, tombolo, kvizo, dancoj.

Rumjana GEORGIEVA

GABROVO. La 14-an de decembro 1988 en la Verda Salono de la Domo de Kulturo okazis urba kunveno, dediĉita al la 129-jariĝo de d-ro Zamenhof.

Pri la vivo de Zamenhof parolis Neno Janev. B. Prodanova rakontis pri la Zamenhofaj obeliskoj en eksteralando. K-do Djanko Mincev deklamis la versaĵon „La Vojo“ de Zamenhof.

Fine gelernantoj el 3-a elementa lernejo kun gvidanto M. Bojkova plenumis belartan programon.

La saman vesperon en lernejo „T. Karpinskaja“ okazis solenaĵo dediĉita al d-ro Zamenhof kaj al la 73-a UK de Esperanto en Roterdamo.

Pri la vivo de d-ro Zamenhof parolis S. Tiĥova.

Poste ŝi rakontis pri la UK en Roterdamo kaj iom pri Nederlando, kaj projekciis diapozitivojn pri Roterdamo, Gouda kaj Kinderdijk.

Fine la gelernantoj kantis kaj deklamis en Esperanto.

Sonja TIĤOVA

DIMITROVGRAD: La 16-an de decembro 1988 E-societo „Georgi Dimitrov“ — Dimitrovgrad, solene notis la 129-an naskiĝtagon de Ludoviko Lazaro Zamenhof — kreinto de la internacia lingvo Esperanto.

Raporton pri lia vivo kaj agado faris Ivan Dobrikov, vicprezidanto de la E-societo en Dimitrovgrad. Gastoj de la solenaĵo estis Palaŝev, sekretario de Urba Komitato de Patrolanda Fronto kaj esperantistoj el Stara Zagora kaj Ĥaskovo.

Minka KAZAKOVA

MIĤAJLOVGRAD. La 15-an de decembro 1988 E-societo „Septembra Gloro“ celebris la 129-an naskiĝtagon de d-ro Zamenhof. Ne mankis la tradiciaj solena parolado kaj belartaj programoj omaĝe al la iniciatinto de Esperanto.

Metodi Kovaĉevski, Nikola Atanasov k. a. E-veteranoj rakontis pri la historio de nia movado en la regiono. La multjara instruistino de Esperanto Mariana Popova parolis pri problemoj de la E-instruado en lernejoj. Oni laŭtlegis salutleteron de la prezidanto de la eksa Distrikta Estraro de BEA A. Zamfirov, kiu ne povis ĉeesti la kunvenon. La belar-

tan programon partoprenis la premiitoj de la Revuo de E-parolo kaj Kanto — Pleven'88, Desislava kaj Ĉavdar Geraskovi kaj Nina Pekina. La profesiaj aktoroj Ĥristo Kuzmov, Jordan Vitljamov kaj Petko Penĉev variigis la programon per muzikaj interpretoj. Dum la kunveno oni havis la eblecon aĉeti diversajn librojn kaj esperantajn.

Ĝojiga estas la fakto, ke la E-movado en Miĥajlovgrad plivigliĝas, ke la loka esperantistaro montras veran engaĝon por la E-agado. La kunveno daŭris pli ol tri horojn, sed neniu emis foriri. Oni ne nur rememorigis kaj pritaksis estintaĵojn, sed ankaŭ esprimis ideojn kaj proponojn pri estonta agado.

La kunveno organizita dank' al la klopodoj de la energiplena kaj entuziasma prezidantino de societo „Septembra Gloro“ Ljubka Metodieva aktivigis la homojn, stimulis ilian iniciatemon, vekis deziron pri novaj renkontiĝoj.

Bedaŭrinde, pro la malbona vetero oni ne povis realigi gravan kaj vere efektan programon, per kiu la organizantoj intencis atentigi la lokan loĝantaron pri Esperanto. Pri kio temas? Ĝis la realigo tio estu sekreto. Es-

pereble ni baldaŭ ricevos pliajn informojn el Miĥajlovgrad.

Mairana EVLOGIEVA

ORJAĤOVO. E-societo „Georgi Stanev“ celebris la naskiĝtagon de Zamenhof. Laŭ la loka radiostacio Rumjana Bogdanova tra legis koncizan biografion de d-ro Zamenhof.

Nadejda BOSAŠKA

PLEVEN. La 14-an de decembro 1988 estis aranĝita solena vespero omaĝe al la 129-a datreveno de la kreinto de Esperanto d-ro L. L. Zamenhof.

La solenaĵo okazis en la salono de legosocieto „Liljana Bârdarova“. Tie je la 18-a horo kunvenis multaj esperantistoj — veteranoj, societaj estraranoj, E-instruistoj, kursanoj el la nunfunkciaj E-kursoj.

Lernantinoj el la Faklernejo pri Lakta Industrio kaj el lernejo „D-ro Petâr Beron“ plenumis riĉan literaturan-muzikan programon, preparitan de la instruistoj Koĉevska kaj Ivanova.

Post la programo Vâlka Dobрева, prezidantino de E-societo „Eterna Amikeco“ disdonis la diplomojn de gelnantoj el la Faklernejo pri

Lakta Industrio, kiuj sukcese finis E-kurson por I grado.

Sekvis projekciado de la video-filmo „Esperanto centjara“, kiu konigis al la ĉeestantoj la disvastigon de Esperanto en diversaj mondpartoj, speciale en malproksimaj de ni landoj kiel Sud-Ameriko, Japanio, Ĉinio. En la filmo estis fiksitaj momentoj el la internaciaj kongresoj en Belgio, Pollando, Ĉinio, ĝi montris kiel dank' al Esperanto kreiĝas amikaj kontaktoj inter homoj el la tuta mondo — diversaĝaj, kun diversaj profesioj kaj haŭtkoloro.

La vespero pasis en amika etoso.

Nadejda IVANOVA

VRACA: Per recitalo de la Esperanto-poetoj Ĥristo Gorov kaj Venelin Mitev kaj de la dramaturgo Ljubomir Trifonĉovski, la loka esperantista societo „Sukceso“ celebris la naskiĝtagon de d-ro Zamenhof. La veterano Radoslav Triĉkov transdonis al novaj esperantistoj iliajn membrokartojn.

Estis anoncote, ke la Komunuma Konsilantaro en Vraca donacis al Esperanto-societo „Sukceso“, por ĝiaj bezonoj domon, kiun (post la rekonstruo) oni planas inaŭguri fine de 1989.

LEGU EN ESPERANTO!

Ukrainia Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando eldonas ĉiumonate revuon „Tra soveta Ukrainio“. Ĝi aperas en la lingvoj: ukraina, rusa, franca, angla hispana kaj germana. La Societo, kunlaborante kun la Ukraina Respublika Filio de la Asocio de Sovetiaj esperantistoj, aperigas specialan numeron de la revuo en Internacia Lingvo, dediĉitan al la Granda Oktobra Socialisma Revolucio.

En la 36-paĝa kajero aperis interesaj materialoj pri la nuntempa vivo en la Ukraina SSR — unu el la plej grandaj respublikoj de Sovetunio. Multaj materialoj temas pri la novigo kaj la publikeco.

Ĉu vi deziras legi ankaŭ aliajn kajerojn de revuo „Tra Soveta Ukrainio“ en Esperanto? Se jes, skribu al Ukraina Respublika Esperanto-Filio, Kiev 21, SU-252021, Sovetunio.

80 jarojn Esperanto en Gorna Orjaĥovica

La 10-an de decembro 1988 en urbo Gorna Orjaĥovica en la salono de popola legejo „Napredâk“ okazis solena kunveno lige kun la 80-a datreveno de la fondiĝo de E-movado en la urbo.

Ĉeestis pli ol 450 personoj — malnovaj esperantistoj, komencantoj, amikoj de Esperanto, gastoj el multaj urboj. Partoprenis ankaŭ du junuloj el Kubo, kiuj laboras en Ruse.

La solenan kunvenon partoprenis ankaŭ prof. d-ro Kiril Popov kiel reprezentanto de CE de BEA, Ilija Miĥajlov, el la Komunuma Komitato de la BKR, Atanas Petrov el la Komunuma Komitato de Komsomolo, la nepino de Ĥristo Popov (la unua bulgara esperantisto, fondinto de la E-movado en Gorna Orjaĥovica).

Interesan kaj detalan raporton pri la 80-jara E-agado en la urbo faris la prezidanto de E-societo „Espero“ — Kostadin Akâliev. Sekvis salutparoloj de la gastoj. Tre varma estis la salutparolo de Ilija Miĥajlov — sekretario de la Komunuma Komitato de BKP,

en kiu li montris la bonan rilaton de la komunuma estraro al la esperantistoj kaj ilia agado.

Multaj aktivuloj de la societo estis distingitaj per jubileaj medaloj kaj insignoj de BEA, kiujn prof. d-ro Popov mem enmanigis al ili.

La solena kunveno finiĝis per belarta programo, kiun partoprenis la E-koruso de societo „Espero“ — G. Orjaĥovica, sub la gvido de Enĉo Balanov, E-teatro el Stara Zagora kaj la fama popola ensemblo „Sider Vojvoda“ (same el Gorna Orjaĥovica).

Tre agrabla estis la Interkona Vespero kun multaj distroj kaj dancoj.

La 11-an de decembro, dimanĉe matene, la programo de la festo denove estis riĉa je aranĝoj: vizitoj al la urba historia muzeo kaj al la ekspozicia halo. Fine oni veturis al urbo Dolna Orjaĥovica, kie trarigardis la domon muzeon de Ĥr. Popov — la unua bulgara esperantisto, kaj aŭskultis la rakonton de lia nepio Virginia Kirĉeva pri la vivo kaj agado de ŝia avo.

Penka BUJUKLIEVA



Rememoro de la pasintjaraj Turistaj Tagoj.

KVARAJ TURISTAJ ESPERANTO-TAGOJ EN SOFIO (9, 10, 11 de junio 1989)

9-a de junio: Alveno de la partoprenantoj.

INTERKONA VESPERO. Programo.

10-a de junio. E-TALENTULOJ SIN PREZENTAS. Varia belarta programo sur la scenejo de la Kulturdomo en Panĉarevo por ĉiuj, kiuj anoncis sian partoprenon. Kolektivaj ludoj kaj kantado. Promenado per ŝipo sur lago k. a.

11-a de junio. FESTO DE MONTODOMO „ESPERANTO“, belarta programo, kolektivaj ludoj. Montara kurado por ĉiuj sub la aŭspicio de revuo „Bulgara Esperantisto“. Vendado de esperantaĵoj.

Por pliaj informoj turnu vin al LA ORGANIZA KOMITATO, PK 45, BG-1090, Sofio, Bulgario.

En la Kulturdomo „ORBITA“ en urbo Poznan (Pollando) la 20—23.10.1988 okazis Esperantaj Kulturaj Tagoj. Partoprenis plenumantoj el Pollando, GDR, Ĉeĥoslovakio kaj el Bulgario (Todor Atanasov, Ĥristina Ivanova kaj Rangel Dimĉev). La kultura programo estis tre riĉa: multaj bonaj spektakloj, muzikaj programoj, recitaloj, fotoekspozicioj. La regionaj gazeto kaj radio prezentis la kulturajn tagojn.

Plej fortan impreson laŭ mi faris la spektaklo „Fingreto“ de la Ŝtata Pupteatro el urbo Torun. La spektaklo gajnis la I premion en la pupteatra festivalo en Zagrebo (Jugoslavio). Tre bonaj estis ankaŭ la spektakloj „Sinjoro Tadeo“ (laŭ la romano de Adam Mickiewicz en traduko de Antoni Grabowski — teatra grupo „P“, Torun), kaj „Virino kaj kvar bildoj“ de Eduardos Miĉerlajtis. La enscenigo estis de Jerzi Fornal — aktoro el la Nacia Teatro en Varsovio.

Ege sukcese prezentis sin Jadwiga Gibcinska, kiu aktivas precipe kiel aktorino, sed krom tio ŝi kontribuas ankaŭ per verkado, tradukoj, reĝisorado ktp. La spektaklon „Teatro de unu aktoro“ ŝi prezentis en ĉiuj pli grandaj Esperantaj centroj en Pollando, kaj ankaŭ en Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Tre plaĉa estis la recitalo de Jerzi Handlik (Pollando) — poeto, dramverkisto, komponisto, kantisto. Li verkas paralele en la pola kaj en Esperanto. Dum lia recitalo

ni povis ĝui liajn originale verkitajn en Esperanto kaj tradukitajn kantojn. Li jam kantis en preskaŭ ĉiuj grandaj E-medioj en Pollando, ankaŭ en Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario. Li prezentis sian recitalon dum UK en Varsovio kaj la II Kultura Esperanto-Festivalo en Lund (Svedio). Aperis kasedo kun liaj kantoj. Dum la recitalo ni aŭdis ankaŭ muzikfragmentojn de la kasedo.

Bone prezentis sin la muziktrupo „VSP“ — Bydgoszcz.

La dommastroj organizis ankaŭ konkurson-recitalon por infanoj — ĝis 14-jaraj. Estis prezentita Esperanta poezio de Marsin Borkonski (Poznan). Bone sin prezentis la ĥoro „Kollegium Centrum“.

Tre bona estis la recitalo de Todor Atanasov. Li plenumis popularajn ariojn el italaj operoj, popolajn kantojn en Esperanto ktp. Same bone sin prezentis Ĥristina Ivanova per sia prelego pri temo „Muziko kaj muzikaj ĝenroj“. Mi parolis pri la nova grafika kaj arta aranĝo de „Bulgara Esperantisto“.

Konklude mi volas substreki, ke la Esperantaj Kulturaj Tagoj en Poznan estis tre interesaj kaj utilaj. Dank' al similaj aranĝoj al la E-movado aliĝas multaj amikoj de la arto.

Rangel DIMĈEV

E-SPELEOMOVADO

Ekde tri jaroj, en Slovakio ekzistas nova E-fako, la E-speleomovado, kiu ĉiujare pliampleksiĝas — la unuan speleotendaron partoprenis nur ĉeĥoj kaj slovakoj, poste aliĝis ankaŭ hungaroj kaj unu hispano. Pasintjare la III-a Internacia Speleotendaro okazis de la 20-a ĝis 23-a de oktobro 1988 en Slovakio, en la Altaj Tatroj, apud urbo Liptovski Mikulaŝ. Ĝin partoprenis geesperantistoj-speleologoj el Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj por la

unua fojo — el Litovio kaj Bulgario. Krom la interŝanĝo de speleosperto, grava celo de la fakgrupo estas verkado de speleologia fakvortaro.

La prelegoj kaj diskutoj temis pri la fakvortaro, pri naciaj speleologioj ktp. Oni interŝanĝis opiniojn rilate la speleologion kaj projekciis diapozitivojn.


La grupo havas jam sian bultenon „Vesperto“, kun ĉefredaktoro inĝ. - Petro Vukov.

Dum la speleotendaro la par-

topenantoj vizitis la Muzeon de Slovaka Karsto en urbo Liptovski Mikulaŝ. Tie nian grupon akceptis d-ro Stanislav Pavlŕĉik, fondinto de la speleologia ekspozicio en la muzeo.

Estis ankaŭ ekskursoj en la Altaj Tatroj, en la regiono de la Ruĝaj Pintoj. Parto de la grupo penetris en la abismon Zadni Uplas (Koso Drevena) (100 m).

Katja MARKOVA



Deziras korespondi

AFRIKO

GBEGLO KOFFI, E-instruisto el Togolando, estos tre danka al helpemaj samideanoj, kiuj sendus donace al li malnovajn revuojn, librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Tiujn aĵojn mi disdonos al miaj lernantoj por kuraĝigi ilin. Mi mem bezonas librojn, kiuj instru min pri instruado kaj ellerno de Esperanto, pri verkado de poemoj ktp. Mia adreso: GBEGLO KOFFI — B. P. 13169 Nyékonakpoé, LOME-TOGO.

BULGARIO

NOVAJ ESPERANTISTOJ (11—15 jaraj) deziras havi amikojn el la tuta mondo. Adreso de la kursgviganto: 5300 Gabrovo, str. „Komunističeski manifest“ 16, ap. 4, et. 1 — Stefka Toteva.

VIOLETA VASILEVA (13-jara lernantino) — 7005 Ruse, ĵ. k. „Rodina—1“, bl. „Stranĝa planina“, vñ. 3, et. 3, Kolektas PM, maĉgumojn kaj afiŝojn.

ROSICA DIMITROVA (24-jara) — 6343 Mineralni bani, Ĥaskovska obl., bul. „Ĥristo Botev“ 7 — kun ĉi pri kino. Kolektas fotojn de filmaj steloj.

NATALIJA BORISOVA (30-jara) — 6343 Mineralni bani, Ĥaskovska obl., bul. „Ĥristo Botev“ 1 — kun ĉi pri muziko, kino, poezio.

GELERNANTOJ (16—18 jaraj) deziras korespondi kun gejunuloj el ĉi. Komuna adreso:

STOJAN TINĈEV, 5100 Gorna Orjaĥovica, TET „Lomonosov“.

ĈEĤOSLOVAKIO

RICHARD LAPŠANSKÝ (20-jara grafikisto) — Bajzova 21/78, 010 01 Žilina — kun ĉi pri ĉi.

JURAJ HREUSIK (12-jara lernanto) — Gaŝtanová

5, A2/30, 010 01 Žilina — kun ĉi pri paperaj kaj plastaj modeloj kaj pri naturo.

Ing. JURAJ HEREUSIK (39-jara esploristo) — Gaŝtanová 5, A2/30, 010 01 Žilina — kun ĉi pri naturo.

Ing. TIBOR PENZEŠ (30-jara esploristo) — Borová 29, 010 01 Žilina — kun najbaraj kaj kun angle parolantaj landoj pri naturo, tekniko, sporto kaj kulturo.

EMILIA KOLEDONÁ (45-jara instruistino) — Sevná 25, 010 01 Žilina — kun ĉi pri ĉi.

POLLANDO

PIOTR CYMERMAN (20-jara studento) — Mariańów 11, PL—98—105 Wodzierady — kun bulgaraj gejunuloj pri historio, fremdaj lingvoj, geografio kaj turismo. Kolektas esperantaĵojn por biblioteko.

BARBARA PRAZYCH (10-jara lernantino) — 15—207 Bialistoko, ul. „Piastowska“ 13 m. 54 — kun ĉi pri ĉi.

MAGDALENA PRAZYCH (11-jara lernantino) — 15—814 Bialistoko, ul. „Palmowa“ 22 m. 73 — kun ĉi pri ĉi.

DOROTA MACZKA (24-jara oficistino) — ul. Meynarska 22/28, 08—110 Siedlce — kun ĉi pri turismo, historio kaj literaturo. Kolektas BK.

ARKADIUSZ KOWALSKI (31-jara oficisto) — 26—110 Skarżysko — Kam. ul. „Slowackiego“ 33/16 — kun ĉi pri turismo, literaturo kaj folkloro. Kolektas PK.

MARZENA STOTWINSKA (22-jara) — ul. Chelmonskiego 53, 65—698 Zielona Gora — kun ĉi pri antikva historio, historio kaj kulturo de la Malproksima Oriento, pri floroj, bestoj k. a.

SCIIGOJ

● Bulgara Esperantista Kooperativo mendis en la Monfarejo dispecajn Esperanto-insignojn. Ilin oni vendas en la magazeno de la Kooperativo. Alispecan insignon vendas la Libro-Servo de BEA, bul. „Ĥr. - Botev“ 97 — Sofio.

● Bulgara Esperantista Asocio eldonis du specojn da flugfolioj pri Esperanto. Per ili oni komencas aperigi serion da esperantaĵoj, kiuj estas tre bezonataj kaj serĉataj de la esperantistoj.

● La Esperanto-Asocio en la Kulturligo de GDR, Otto Nuschke Str. 1, Berlin 1080 kunlaboris, por ke oni eldonu prospekton pri kasteloj kaj parkoj de Potsdam-Sanssouci. La prospekto helpas por evoluo de la Esperanto-turismo.

● La mondkonata komputila firmao IBM ellaboris novan

presprogramon en kelkaj lingvoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto. La programo ebligas presi esperantlingvan tekston per lazer-presiloj. Detalaj informoj estas haveblaj ĉe la reprezentejoj de la firmao en multaj landoj.

● Esperanto estas uzata de la hungara Vojaĝasekura Kompanio Atlas. Ĝiaj asekuraj kontraktoj por eksterlandanoj estas presataj ankaŭ en Esperanto. Ili estas akireblaj en ĉiuj vojaĝoficejoj de IBUSZ kaj en la filioj de la Hungara Ŝtata Asekura Kompanio.

● La Agrikultura Ekspozicio de GDR „Agra“ eldonis multpaĝan koloran prospekton „Naturprotektado en Germana Demokrata Respubliko“. Oni povas peti senpagan ekzempleron de la prospekto ĉe: Landwirtschaftsausstellung der

DDR, agra-buch, Raschwitzer Straße 11/13, Markkleeberg, DDR—71131. La prospekto estis eldonita dank'al la klopodoj kaj kunlaboro de Esperanto-Asocio en la Kulturligo de GDR.

NI KONDOLENCAS

La 21-an de oktobro 1988 en Radomir forpasis la estiminda veterano *Petăr Miĥajlov Ivanov*, naskita la 17-a de majo 1908. Li estis unu el la fondintoj kaj multjarâ estrarano de E-societo „Fajrero“ kaj membro de UEA.


E-societo „Fajrero“,
Radomir

MODO SUR LA LABORLOKO

Kiajn vestojn ni devas porti en la labortagoj, sur la laborloko? Responde al tiu demando la bulgaraj dezajnistoj ĉiam proponas praktike kaj estetike valorajn solvojn. La vestaro de profesie laboranta virino devas esti konvena al ŝiaj okupoj. Memkompreneble, temas ne pri tiuj, kiuj estas profesie devigitaj vesti sin en la borrobo aŭ en speco de uniformo, sed pri tiuj, kiuj povas elekti el sia ĉiutaga vestaro.

La trafe elektita kompleto de vestoj ŝparas al la virino la ĉiumatenan haston antaŭ la spegulo kaj la ĉiaman demandon — kion surmeti? Sed, kompreneble, konvena estas tiu ensemblo, kio kontentigas kelkajn konkretajn postulojn.

Unualoke, la ĉiutaga vesto devas esti majstre elaborita kaj eleganta, en ĝi la virino devas aspekti bele — en tia vesto ŝi sentos sin bone sur la laborloko. La bele kaj konvene vestita virino postlasas ĉe la kolegoj kaj ĉe eksteraj vizitantoj (se la laboro tion postulas!) agrablan impreson kun nuanco de nealtrudiĝema virineco. Certe estas superflue averti kiel ridinde aspektas virino en pompa, malŝpareme ornamita per



luksaj detaloj kaj ornamaĵoj vesto en la afereca atmosfero de ŝia laborloko.

Ofte oni devas kelkfoje en la tago transvesti sin, depende de la karaktero de la laboro. Tial la elementoj de la laborensamblo devas esti facile anstataŭigeblaj, por ke la virino estu ĉiam konvene vestita. Niaj konsiloj ne nepre instigas al aĉetado de novaj vestoj, oni devas nur pli atente esplori sian vestaron.

La bluzo kaj la jupo — tiu ĉiam laŭmoda kombinaĵo — ankaŭ nun helpas nin. La ĉi-printempa modo postulas, ke ili harmoniu laŭkoloro. Dominas la sporta stilo: la bluzo havas eksterajn poŝojn, kaj la jupo — alkudraĵon. La jaketo estas aparte konvena por ĉiusecaj kombinaĵoj. Unukolora aŭ kvadrata, ĝin oni povas porti sur jupo kaj bluzo aŭ sur robo de tipo „ĉemizeto“.

Dum tiu sezono tre modernaj estas la jako de speco „bolero“ — longa ĝis la talio, malstrikta, kun longaj manikoj, kiun eblas surhavi dum la tuta tago. Blanka garnaĵo en formo de kolumo donas al ĝi aferecan kaj junecan aspekton.

Multaj estas la proponoj de la modistoj, do ĉiu virino mem devas lerte elekti la plej konvenajn, por ke ŝi komencu la labortagon kun ĝojo.





RIDU KUN NI

En kafejo junulo proksimiĝas al la tablo, ĉe kiu sidas bela svelta junulino kaj demandas:

- Ĉu la seĝo apud vi estas okupita?
- La seĝo jes, tamen mi ne...

— Avĉjo — diras la nepineto — mi petas, fermu viajn okulojn!

— Kial?

— Panjo diris, ke ni fariĝos riĉuloj, kiam vi faros tion.


Juna paro alvenas al la fervoja stacidomo kun multe da valizoj kaj pakaĵoj.

La edzo: Mi bedaŭras, ke ni ne kunportas la pianon.

La edzino (kolera): KREDU min, vi ne estas tre sprita.

La edzo: Mi ne deziras esti sprita. Simple ni forgesis la vojaĝbiletojn sur la piano.

AMUZA ZODIAKO



FIŜOJ
(19.02—20.03)

*Fiŝoj mildaj estas kaj bonetaj,
homoj bonkonduktaj kaj modestaj.
Al oferoj grandaj ili pretas:
tamen ilin ofte oni tretas...*

*Ke Fiŝviroj bonas — tio veras,
ve, la Inojn... kiu fintoleros?
Iulinoj estas birdoj kantaj,
sed aliaj — tedaj monpetantoj,*

*ofte ili kontraŭ vivo plendas,
milojn da konsiloj al ni trudas.
Ĉion solaj estri tro deziras
kaj la virojn je la nazo tiras.*

*Vere, ĉastas kaj moralas Iulinoj,
tamen estas ankaŭ fiaj arogantulinoj.
Ambaŭ seksoj ege ŝatas glason —
en la vino trovas ĝojan tempopason.*


*La Fiŝviroj flue akordiĝas,
bone, se de vi ne konfuziĝas...
La Fiŝinoj estas pleje bonaj,
se obeas ilin blinde ni, sindonaj.*

*Do, principe justas kaj modestas:
fieraĉaj en koler' ne estas.
Nu, al ili Virgoj ŝancon ne alportas,
sed havaĵon ofte forkunportas...*

DIAGONALOJ

A: (De la kvadrato kun la numero, laŭ la diagonalo, malsupre kaj dekstre) 1. Kongresurbo de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto. 2. Supra parto de buŝo. 3. Bela akva floro. 4. Speco de dento. 5. Ĉebrusto. 6. Inicialoj de organizaĵo de la esperantistoj pacagantoj. 8. Organiztaktika militgrupo.

B: (De la kvadrato kun la numero, laŭ la diagonalo, malsupre kaj maldekstre) 2. Prepozicio. 3. Briliga ŝmiraĵo. 4. Malsano de la dika intesto. 5. Diablo, malbona spirito, kontraŭulo de la bono en iuj religioj. 6. Mezurunuo por tempo. 7. Speco de sportludo. 9. Pagilo.



Noto de la Redakcio:

Esperantista societo „Septembra Gloro” — Miĥajlovgrad, proponas al la legantoj de „Bulgara Esperantisto” enigmokonkurson. La solvon de „Diagonaloj” sendu ĝis la fino de majo j. k. laŭ adreso: Esperantista societo „Septembra Gloro”, p. k. 6, 3400 Miĥajlovgrad. Inter la solvintoj estos lotumitaj tri libropremioj.



Esperantigis: Asen JOSIFOV